

# Tra La Mondo

## Tutmonda ilustrata Revuo Esperantista

TRA LA MONDO · ESPERANTO · SEMAS · SIATNI · BONAJOJN ·  
PLI FACILIGAS · LA · KOMERCAJN · INTERRILATOJN · KONIGAS ·  
LA · INPAJN · ELTROVOJN · KUNHELPOS · POR · ANSTATAVI ·  
DE · FRUKTOJONA · PACO · LA · SANGAJN · BATALADOJN ·  
KIUJ · DISSTRAS · HOMA RON ·



*Allegorio speciale verkita de Sinjoro Pillet, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de V granda premio.*

Jara abonkosto : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abonkosto : 2.25 fr.

# GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

Paĝo.

Nuntempaĵoj: Kristnaskaj kutimoj en Anglujo, de Fino Oxenford, el Brighton (ANGLUJO) . . . . .	65 <sup>a</sup>
Ĉieaj eĥoj: Rusujo, Ĉilio, Francujo, Hungarujo, Siberujo, Hispanujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo . . . . .	67 <sup>a</sup>
Diversaj sciencoj (Geografio): La plej nordaj loĝantoj de la tutmondo, de Pro Bord, el Beaune (FRANCUJO). . . . .	68 <sup>a</sup>
Diversaĵoj: Vitromeza Sunfesto, de S <sup>o</sup> Lundgren, el Hedemora (SVEDUJO). . . . .	70 <sup>a</sup>
Pri Esperanto: La fino de l' Kongreso: en Kales'o, de Aŭgusto Montrosier . . . . .	72 <sup>a</sup>
Kroniko, de Aŭgusto Montrosier . . . . .	74 <sup>a</sup>
Bibliografio: Kristnaska manĝo, eltiraĵo el: « Kristnaska sonorado » de S <sup>o</sup> Martyn Westcott (ANGLUJO);	76 <sup>a</sup>
Gejunula kaj paĉja pago: Vintraj ludiloj, de S <sup>o</sup> René Blottière, el Meudon (FRANCUJO). . . . .	78 <sup>a</sup>
Felietono: La duonokulvitro, de S <sup>o</sup> A. Baissac, el Konstantino (ALĜERIO). . . . .	80 <sup>a</sup>
Miksajoj: Por la propagando, amuzajoj, ludoj, spritaĵoj, de S <sup>o</sup> Ch. Brunet, el Bordo (FRANCUJO). . . . .	80 bis

## REPRESO DE ARTIKOLOJ KAJ ILUSTRAĴOJ.

Kelke da niaj kunfratoj esperantistaj kaj ne esperantistaj esprimis al ni la deziron represi niajn artikolojn. Ni volonte tion permesas por artikoloj sed ne por ilustraĵoj, kondiĉe ke oni ĉiam sciigu la devenon de tiuj artikoloj, aldonante la adreson de l' administracio kaj la plenajn prezajn kondiĉojn:

**JARA ABONO:** En ĉiuj landoj: **8 fr. — KVARONJARA ABONO: 2 fr. 25 c.**

**DUONJARA ABONO: 4 fr. 50 c. — UNU NUMERO, AFRANKITA, 0 fr. 75 centimoj.**

Escepte por pago de specimenoj, oni akceptas poŝtmarkojn — *po 3/4 de ilia valoro* — sed nur el landoj ne havantaj internaciajn mandatojn.

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendi ĉiujn dokumentojn (*krom miksajoj*) al S<sup>o</sup> Montrosier, 74 Faubourg Bannier, Orléans, (France). Miksajoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Sendi mendojn KUN MONO al:

**Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.**

## ONI POVAS MENDI ĈE « TRA LA MONDO »

Ĉiujn librojn kaj gazetojn esperantajn. Mendoj estas ĉiam rapide plenumataj. Aparte oni povas aboni je « Gefrataro esperantista » (4 fr. ĉiujare), « Germana esperantisto » (3 fr. 37) kaj « Espero Katolika » (2 fr.).

Ĉiuj mendoj devas esti akompanataj de l' mono necesa por pagi la abonon aŭ la volumojn, ne forgesinte fiksitan rajton da 10 centimoj por korespondado, kaj la koston de l' sendo NUR POR LA LIBROJ. Tiu kosto estas 0 fr. 10 ĝis valoro de l' fr., kaj 10 % por pli kostaj volumoj.

Pro la pli kaj pli kreskanta nombro de ricevataj petoj pri sciigoj ni, estonte, respondos nur kaj nepre je petoj akompanataj de poŝtmarko por la respondo.

Ni petas personojn, kiuj ne havas tre gravan kaŭzon por alie agi, aboni kaj abonigi senpere ĉe nia administracio.

## Kiu estas tiu leterportisto??

La malfeliĉulo, kiom terure li estas ŝarĝita. Estas vere nehoma tiel trouziĝfortoj de viro, vi diros eble, amikoj legantoj. Ne koleru, ĉar vi havas parteton de respondeco en tiu afero. Por vi, por via revuo, li alportas ĉiutage montojn da dokumentoj el ĉiuj landoj.

Jen estas, efektive, kelkaj el la manuskriptoj kiuj atendas spacon en niaj kolonoj:

La suneklipsoj (sunmallumiĝoj), kaj la generado spontanea (senkaŭza), de S<sup>o</sup> Marcel Finot (Francujo); Pri Hindujo de S<sup>o</sup> Adinarajana Chettiar (Hindujo); La Harakiri'o (Japana memmortiĝo), de S<sup>o</sup> Difre, el Konstantino; Enŝipiĝo de elmigrantoj, de S<sup>o</sup> Legoffre (Francujo); La « Suk », el Tunizo, de S<sup>o</sup> Nicolas (Tunizio); Japanaj rakontoj, de D<sup>o</sup> Gambier (Francujo); La vivado de teoplantisto en Hindujo, de S<sup>o</sup> Simper (Hindujo); Movado abstinenca en Svedlando, de S<sup>o</sup> Gutke (Svedlando); La skota danco de l' glavo, de S<sup>o</sup> Slater (Anglujo); Epizodo de l' rusa-japana milito, de S<sup>o</sup> Ulriko Jijkovan (Bohemujo); Ruinoj el Wisby, de S<sup>o</sup> Hedsström (Svedujo); Saharaj impresoj, de Leŭtenanto Lesne, (Alĝerio); La glavo, el « La sentimental voyaĝo », tradukita de S<sup>o</sup> Snape (Anglujo); Britaj kutimoj de Fraŭlino Oxenford (Anglujo); La rusa-japana milito je l' medicina vidpunkto, de D<sup>o</sup> Gambier (Francujo); Pejzaĵoj kaj moroj galicujaj, de Fino Solichon (Hungarujo); La « Rigodon'o », franca danco, de Fino Chautard (Francujo); La Metamorfozo, turka rakonto, esp. de S<sup>o</sup> Oreškov (Bulgarujo); La fabrikado de l' pipoj, de S<sup>o</sup> Maurice David (Francujo); Edziĝo kabila, de S<sup>o</sup> Villiard (Alĝerio), k. t. p., k. t. p....

## NIA NOVJARA NUMERO.

Ĝi estos tre bela kaj enhavos, inter aliaj verkoj:

« Judith » originala novelo, bele ilustrita de l' aŭtorino, fraŭlino Oxenford, kies verk = kaj arttalenton niaj legantoj povas ŝati hodiaŭ;

« La profesiaj soldatoj en Svedujo kaj ilia malapero », de nia ankaŭ tre lerta kaj artista kunlaboranto, S<sup>o</sup> Lundgren;

« Blinduloj kaj Surdmutuloj », kortuŝa kaj tre interesa rakonto, de S<sup>o</sup> Luis Carlos, kun multaj ilustraĵoj;

Nia kutima kaj viva « Kroniko »; k. t. p., k. t. p....

## Tiu numero estos vera « NOVJARDONACA NUMERO ».

Ni esperas ke niaj penadoj estos rekompencitaj, kaj ke kelke da niaj legantoj, el tiuj, kiuj povas senĝene elspezi iom por l' ideo esperantista, kiun ili defendas, volos aĉeti kelke da ekzempleroj de l' kristnaska kaj novjara numeroj por ilin disdoni inter siaj amikoj esperantistaj aŭ esperantistigeblaj.

## Neniu pli bona novjara donaco ol « Tra la Mondo »

povas esti donacata je l' okazo de l' unua de januaro 1906.

Pro edziĝo de S<sup>o</sup> Aŭgusto Montrosier kun nia kunlaborantino, fraŭlino Danne, la artikoloj de tiu lasta estos, de nun, subskribataj « Steleto ».



# KRISTNASKAJ KUTIMOJ ANGLAJ



En Anglujo, landoj, oni preskaŭ kutimojn kiuj ekzistis en la popoloj estis pli simplaj kaj ĝegas la kristnaskan feston, fa festo de la jaro; kaj estas las iom diferencigi la tagon de la altaj klasoj al la plej malaltaj, la programo de la tago. — La Angla historio estis en 790, kiam toju de Offa, reĝo de Mercia, dum tiu tempo, kiaj ajn estas la kondiforgesas manĝi, trinki kaj ĝoji

Ĉirkaŭ tri semajnoj antaŭ la la stratojn vespere, kantante «cankanton, sed kiu estas netradukestis kantataj de la plej fruaj ĉefa « carol » estas « Dio savu vin ĉagreni; ĉar Jesuo Kristo nia (mi bedaŭras ke mi ne povas traĝenerale komencas siajn kantojn. Ili pasas de domo al domo, kolektante monon.

La nokto antaŭ Kristnasktago, muzikistaroj ludas noktomeze en la stratoj. Tiuj ĉi estas nomataj « Waits », alia netradukebla vorto, kiu devenas de la malnova angla vorto « wakeths », signifanta vekantoj. La « wakeths » en treege malnovaj tagoj kutimis iradi ĉirkaŭ la eksterurbaj vilaĝoj kaj lokoj veki la loĝantojn por ke ili povu iri frue al la religiaj ceremonioj kaj la sekvontaj festenoj.

La kvar ĉefaj necesajoj por ĝui kristnaskan sezonon en Anglujo estas: rostbovajo, kristnaskapudingo, ilekso kaj visko; sed el tiuj kvar, la pudingo estas la plej necesa. Oni povas manĝi aliajn viandojn, oni povas seniĝi la ilekson kaj eĉ la viskon (ne ĉiam oni bezonas viskon por povi kisi); sed ne havi pudingon, estas la plej malkontentigaĵo. La « Christmas Pudding » estas la fundamento de la angla Kristnasko, kaj kiam alvenos la tago en kiu tiu ne estos vidata sur la angla tablo, tiam oni povos atendi la falon de la angla konstitucio. La antaŭtago oni ornamas la preĝejojn kaj domojn per ilekso kaj ĉiamverdaj folioj, ne forgesante pendigi branĉon de visko, tialoke ke estas facile kisi sube (Sed tiu lasta nur en la domoj, ĉar la visko estas restaĵo de la Druidaj tagoj, kaj tial ne decas en la kristanaj preĝejoj). Oni de la ilekso elek-

kiel en aliaj forgesas la multajn malnovaj tempoj, kiam la naturaj. Sed neniam ni forkiu en tiu ĉi lando estas la ĉemalmultaj personoj kiuj ne cennaskiĝo de Kristo. De la plej festenoj kaj gajeco estas en unua sciigo pri Kristnasko en la Kimroj subite atakis la soldaĵili festis Kristnasktagon, kaj de ĉoj de l' vivo, la Angloj neniam en tiu tago.

festatago, geknaboj promenadas rols », vorton kiu signifas ĝojan ebla Esperante. Tiuj ĉi ĝojkantoj tempoj, sed de tri cent jaroj, la vin, gajaj sinjoroj, lasu nenion savinto, naskiĝis en tiu ĉi tago » duki poezie), kaj per tio la infanoj

pretendis ke la kvalito tita por ornam



la ĉambrojn montris tiun, kiu regnos en la domo dum la sekvonta jaro. Se oni elektis la pikan specon, la edzo estos regnestro; sed se la ebenan, la edzino estos vere la mastrino de sia edzo, egale de la domo.

Antaŭ Kristnasktago, la urbestroj kaj bonfaraj societoj klopodas provizi por tiuj malfeliĉuloj, kiuj estas tro malriĉaj por sin men provizi; kaj ĉio estanta pretigita, la ordono de konduto por la tago estas: 1<sup>e</sup> Iri preĝejon matene; 2<sup>e</sup> Manĝi la rostbovaĵon kaj kristnaskan pudington, post tagmeze; kaj 3<sup>e</sup>. La tutan tagon kisi sub la visko ĉiujn, kiujn oni povas kapti sub la branĉo, aŭ bonokaze, se oni portas malgrandan vergeton por teni super la kisoto; ĉar tio ĉi estas la sola tago de la jaro en kiu viro povas kisi ian ajn virinon, ne estante mallaudinda. Eĉ piaj personoj ne pensas, ke estas peko kisi sub la visko je Kristnasko, sed ridetas bonhumore se oni kaptas ilin. Estas malfacile trovi la devenon de la kutimo.

Ĉiuj, kiuj povas, pasigas la feston vizitante, farante donacojn, vespermanĝante kun geamikoj, kantante, dancante, kaj inter la mezklasoj, dum la vespero ludante multajn specojn de ludoj tiaj kiaj « Blindman's Buff », en kiu la okuloj de persono estas kovritaj, kaj poste, li aŭ ŝi devas peni kapti iun el tiuj kiuj ĉirkaŭkuras; se ĝi kaptas kaj povas diveni tiun, kiu estas la kaptito, ĉi tiu siavice iĝas « blindulo ».

Festenoj por la infanoj estas tre popolamataj kaj ĉe tiuj ĉi la maljunaj rejuniĝas mallongatempe, kaj forgesas siajn ĉagrenojn kaj doloraĵojn. La Kristnaska arbo estas la ĉefa objekto; tiu ĉi portas kandletojn kaj donacojn por la infanoj. La kandletoj estas ekbruligitaj kaj la arbo aperas tre hela kaj alloga al la okuloj de la gejunuloj. Alia favora kutimo, aŭ ludo, kiu kelkafoje iĝas pli ol ludo, estas « Snap-dragon » (alia ne tradukebla vorto). Profunda plado estas plenigita je brando, en kiu naĝas sekvinberoj; la lumoj en la ĉambro estas estingitaj; kaj tiam la brando estas ekbruligata, kaj ĉiuj povas elpreni la berojn el la fajrigita fluido. La flamoj ŝetas strangajn lumojn al la vizaĝoj de ĉirkaŭantoj, kaj la sceno estas tre amuzanta, kaj la ludo ekcianta, speciale ĉe tiuj, kiuj bruligas siajn fingrojn.

La kristnaska festo estas daŭrigata ĝis la 6<sup>a</sup> tago de l' festo de Epifanio, kiu estas nomita « dekdua

tago» angle; kaj la plimulto de la infanaj festoj okazas en tiu vespero. Sur la tablo estas ĉiam riĉa kuko, kaj ĝenerale en tiu ĉi kuko troviĝas du argentaj moneroj. La du trovantoj de tiuj moneroj iĝas reĝo kaj reĝino de la festo.

En la dekduanokto, ĉe la teatro « Drury Lane », ĉiam oni havas grandegan « Dekdua-kukon », kaj post kiam la ludo estas finiĝinta, la teatranoj kunvenas sur la scenejon por noktomanĝi; kaj sur la tablo estas la kuko, kiu estas nomita « Baddeley » kuko, mi pensas de la nomo de la mortinta aktoro kiu ordonis testamente antaŭ multaj jaroj, ke oni havu ĝin, ĉiujare, en la 6<sup>a</sup> de Januaro. Lia memoro estas toastata, kaj la ĉefa aktoro aŭ aktorino eltrancas la unuan porcion de la kuko, kun multe da ceremonio.

En kelkaj kamparaj lokoj, la « Yule-log » estas ankoraŭ bruligata. Tio estas grandega ŝtupo, kiu estis tre ceremonie portata de la arbaro al la fajrejo. Preter pasante, oni kutimis levi la ĉapon dum ĝia vojaĝo, ĉar oni kredis ke ĝi elbruligos malnovajn ĉagrenojn, kaj ankaŭ saŭmigis la trinkaĵon en la « Wassail-bowl », kiam oni trinkos ĝin, samtempe volante la morton de malpacajoj. Ne estis permesata elbruli « Yule-log » dum la dekdua tago de la festo, kaj la restaĵo de la ŝtupo estis konservata por ekbruligi la sekvontan « Log ». Superstiĉe oni pensis, ke ĝi malhelpas la bruliĝon de la domo dum la sekvonta jaro; ankaŭ oni kredis ke estus tre malbonŝanco se dum la brulado de la ŝtupo, enirus straba persono. Nune, pro la pli bona edukado de la popolo, kiu forigis superstiĉon, oni brulas la « Yule-log », simple pro la ekstera varmo kaj helo, en la kristnaska vespero.

Mi kredas ke en kelkaj el la sudaj vilaĝoj, kie oni faras pomvinon, estas ankoraŭ kutimo trinki por la sano de la pomarboj. En la antaŭvespero, ĉiuj ĉirkaŭas la ĉefpomarbon, kaj la « Wassail » (trinkanto) estas kantata; tiam la enhavo de la pokalo estas ĵetata sur la arbon por certigi bonan pomrikolton, dum la viroj ekpafas per pafiloj kaj pistoloj, kaj la fraŭlinoj kantas malnovan version: « Fruktodonu pomojn kaj pirojn; estu plengarbejoj, kaj sakoj sufiĉaj. Hurrah! Hurrah! Hurrah! »

*Verkita de C. OXENFORD,*

Sekretariino de l' Brighton' a grupo.



## Ĉieaj eĥoj.

### Teruro kaj morto.

El Odessa, speciale por « *Tra la Mondo* ».

*Teruro kaj morto!*

Tiuj ĉi tagoj paligas sangverŝingintajn Arturon, Mukdenon; la granda franca revolucio ne prezentis al Historio tiomajn buĉadojn; jam delonge homaro ne vidis eĉ ion similan al tio, kion pasigis ni.

Miaj manoj tremadas, kiam mi komencas tiujn ĉi liniojn; hieraŭaj teruroj staras vivplenaj ĉe mia rigardo, mi ne esperas per tiuj ĉi nemultaj linioj esprimi eĉ klarigaĵon de tio ĉi: senegala regnado de morto, arbitro kaj frenezo...

Krimega propagando de internacia koloro, per kia na monarka estraro ekscilitinte popolon kontraŭ Hebreoj, intencis neigi alvenitan revolucion ribelon; tiu ĉi propagando nun donis ĝiajn mirindegajn malvarmigantajn sangajn sekvaĵojn; kaj frenezaj, sencelaj, furiozaj batalo kaj buĉado ekbruligis en niaj stratoj.

Dum ĉirkaŭ unu semajno mi aŭskultadis pafadojn, tamburojn; mi aŭskultis ĝemojn de vunditoj; mi ĉiuminute vidis rapidantajn portilojn — kaleŝojn, kie tio ĉi estis eble — forveturantaj vunditojn, Teruraj, teruraj tagoj!...

La internacia koloro atingis sian frenezan apogeon; oni komencis tranĉadi infanojn, neexplorante naciecon: ĝis hieraŭa vespero estis mortigitaj pli ol 8,000 da rusaj kaj judanaj infanoj!

Ok miloj! da... infanoj!!

Tuta Odessa estas disrabita; mortigitojn, neble kalkuli.

Mi skribas en kuirejo, ĉar mia ĉambro estas disbatita per kugloj. Feliĉa okazintaĵo savis min hieraŭ: se mi malrapidis en mia ĉambro ankoraŭ unu minuto, mi estus sendube mortigita, ĉar minuto poste, malgranda bombo falis en tiun lokon, kie mi skribis.

Mi ne povas ĉion esprimi.

Mi vidis ambulancistojn superverŝilajn per sango, kiuj enkuradis korton; kun timitaj vizaĝoj ili pelegis bandaĵojn, kuracilojn...

Mi vidis grandegajn kaleŝojn, kiuj estis plenigitaj per tranĉitaj infanoj... Mi fine vidis amasojn, kiuj subite neĝadis post forta soldata pafado.

Mi ne povas hodiaŭ skribi plu.

Mi skribos poste pri ĉio, sed poste... Nervoj estas ekscititaj... Kvaran nokton ni ĉiuj pasigis sendorme...

VLADIMIR P...

Al la rakonto de tiuj teruregaj tagoj vivitaj, nia korespondanto aldonas jenon:

*Atlestimata Samideano S<sup>o</sup> Montrosier.*

Mi havas plezuron sciigi vin ke mi antaŭ 1 1/2 semajnoj presigis en gazeton «Krima Kuriero» interesan rakonteton, tradukitan per mi el « Tra la Mondo » « Bano de S<sup>o</sup> Pastro ». Se Vi volas, kiam ĉe ni ĉio trankviligos, mi sendos al vi kelkajn ekzempl. de « Kr. Kur. », kie estas presita tradukaĵo. Koran salut! Pardonu, ke mi tiel skribas — mi estas lacegita... Estu sana! Via.

V. P...

Ni ĝojas pri tiu sciigo, kaj dankas kore S<sup>o</sup> P... kiu, malgraŭ la timigaj nunaj okazantaĵoj ne forgesas nian aferon, Povu « Tra la Mondo » helpi lin en lia propagando.

### Ĉilio.

Liaflanke, S<sup>o</sup> Luis E. Sepulveda Cuadra, nia konata ĉilia samideano skribas al ni « mi multe povos utiligi vian belegan revuon en mia propagando por Esperanto en Ĉilio ».

### Nantes (Francujo).

Aliparte Do Saquet, nia fervora propagandisto sukcesis elmontrigi « Tra la Mondo » en la depeŝan ĉambregon de l' « Phare de la Loire », la grava ĵurnalo de l' Nord-okcidenta Francujo. La afero ne fariĝis tute facile. La administrantaro komence rifuzis; sed, laŭ la peto de Do Saquet, la 3 unuaj numeroj estis senditaj, kiam li sciigis nin pri la malsukceso de siaj klopodoj.

Nu, kelkajn tagojn poste, li skribis:

« Post tio, kio okazis pri « Le Phare de la Loire » mi estis tute mirigata tiun ĉi matenon vidante viajn tri numerojn de « Tra la Mondo » aŭŝitajn en la depeŝon ĉambregon de tiu gazeto.

Des pli bone kaj mi rapidas informi vin, kun miaj plej bonaj gratuloj. »

DO SAQUET.

La intereso kaj beleco de nia revuo finis la laboron komencitan de nia sindona samideano; ni dankas lin kaj ĝojas vidi ke, pli kaj pli, nia revuo favore impresas la grandajn naciajn gazetojn.

### Hungarujo.

Sinjoro A. de Marich, la redaktoro de l' bonega revueto hungara « Esperanto » sciigas nin pri la baldaŭa fondo de Hungara Societo Esperanta, kies organizan komitaton li prezidas.

La Societo havas jam grupojn en Versecz kaj Debreczen; kaj estas eble esperi ke Hungarujo, kiu nun montriĝas tiel ageme en siaj postuloj lingvaj volos ankaŭ montri ke ĝi estas granda nacio, enirante decide en la rondon esperantistan. Povu la revuo « Esperanto » kiu jam enhavis bonegajn artikolojn, helpi por la trafo de tiu celo (1).

### Siberujo.

« Estinta Vic-prezidanto de nia grupo Leutenanto N....., kiu estis bona kaj sperta mafociro kaj komandis la helpmilitan ŝipon « Pilka » en printempo de tiu ĉi jaro, post dimanĉa preĝo kaj legado antaŭ liaj komanditoj, laŭte anoncis, ke li kredas ke « milito estas l' afero la plej abomena kaj neinda de Kristanoj, kaj ke de tiu-ĉi momento li ne plu volas esti oficiro. » L' impresado estis granda. Nur dank'al lia antaŭa senriproĉa servado, li estis metata en hospitalon kaj anonciita « freneza ». La maristaro de « Pilka » estas dissendita en diversajn aliajn ŝipojn. Nun N..... forvojaĝas Peterburgon.

Li havis du fratojn maraj oficiroj; unu estis mortigata en Nigra Maro, la dua partoprenis en Cuŝima batalo. »

Sendita de P..., el Vladivostoko.

(1) *Esperanto*, scienca kaj literatura monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

Sendu la jaran abonpagon (4 fr.) al la redaktoro Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

### Hispana eĥo.

Varma akcepto, kora adiaŭo, iluminaĵoj, bova festo, ĉasado, paradaj festenoj, toasto, huraj!!!... kaj pluvo el ordenoj ĝojigis Madridon kaj bruegis la aeron, okaze la vizito de la Prezidanto de Franca Respubliko. La entuziasmo de la diversaj popolaj rangoj estas grava elmontrito de la profunda estimo kaj de la sincera amikeco de l' du najbaraj nacioj, kaj ankaŭ pruvas ke jam ĉiu popolo ekiernas respekti la politikan vivadon de la aliaj, ne intermiksante en ĝiaj privataj institucioj. Ple, feliĉe, tiu amo tute ne signifas malamon al la aliaj, tute ne, kaj per tiaj apartaj alproksimiĝoj, oni sukcesos havigi la plej gravan trezoron en la mondo, la pacon, kiu estas la potencega helpanto de la homa progresado.

Eĉ jam la popolo, dum la lastaj tagoj, anstataŭis malnovan kaj malamikan kanteton per la kortuŝanta jena:

« La Virgen del Pilar dice  
Que no quiere ya rencores,  
Que quiere ser capitana  
De franceses y espanoles »

« Virgulin de l' kolon diras  
Si ne volas iam malamon  
Sed esti militestrino  
De la Francoj kaj Hispanoj. »

Malfeliĉe por Hispanujo, apenaŭ ĉesis la grandaj festoj jam fariĝis en la ministaro plena krizo. Kaj tamen, la liberaloj komencis sian regadon nur antaŭ kvar monatoj! Neeble estas, pro tiuj oftaj ŝanĝoj, plibonigi la administracion de la ŝtato.

R. C.

### Pri la disiĝo de l' Sved-Norvega unuiĝo.

Oni ofte rimarkigis, jam, la malfacilaĵojn kaŭzitaĵn de la neceseco traduki diverslingven la internaciajn konsentojn.

Pri tiu punkto, S<sup>o</sup> Hedström sendas al ni tradukon de eltiraĵo el la norvega artikolo, presita en stokholman gazeton:

« Ankoraŭ daŭros tagoj de atendado. »

Kristiania, la 23<sup>a</sup> de Okt<sup>o</sup> 05.

« Morgonbladet » (*Matena folio*) skribas: Ankaŭ tiu ĉi semajno eble malaperos kaj nenja definitiva decido estos atingita.

Sajne la franca traduko de l' Karlstadaj interkonsentoj kaŭzis neatenditajn malhelplatojn. *Preĉipe pri punkto de limfortikaĵoj kaj iliaj semutiliĝoj, kiu pli poste fariĝos « elirpunkto » por la fremdaj juĝantoj (Elektoj arbitraciaj juĝantoj).*

Dum ni tiel atendadas Stokholmon (Rimarku ke ĝi estas norvega gazeto kiu skribas), kaj pro tio estas malhelplataj fari aliajn paŝojn, dume ankaŭ Kopenhaveno (*Ĉefurbo de Danujo*) atendas nin ambaŭ. Tiamaniere ĉiuj tri nordlandoj estas en stato de « atendado ».

EL STOKHOLMA GAZETO, 25<sup>a</sup> de Okt. 05.

Tradukis P. HEDSTROM.

### Danujo kaj Norvegujo.

Danaj kaj norvegaj esperantistoj ĵus fondis « Societon de danaj kaj norvegaj esperantistoj ».

La dana sekretario estas la konata aŭtoro de lernolibroj, S<sup>o</sup> Fr. Skeel Görling; la norvega sekr. estas stud. Alf. Johnsen.

De NILS ÖKLAND.



Kopirajto. Fot. Isachsen.

El « La Revue de Géographie. »

SUR LA FERDEKO DE « FRAM. »

## La plej nordaj loĝantoj de la tutmondo.

de Profesoro BORD, el Beaune (Francujo).

Pli kaj pli multbliĝas la ekspedicioj en la polusajn landojn, ĉu norden, ĉu suden. La sekvanta artikolo, lerte verkita, resumas unu el la lastaj kaj sciigas nin pri interesaj punktoj de l' vivo en regionoj ankoraŭ malmulte vizitataj de l'turistoj. Ĝi estas ja sezona kaj havas tute pravan lokon en tiu numero.

Ĉu vi scias, kie troviĝas la plej nordaj loĝantoj de la tutmondo? La demando estas interesinda. Malfermu do vian geografian kartaron kaj rigardu *Groenlandon*. Sur la okcidentaj bordoj, vi ekvidos promontoron *York* kaj markolon *Smith* ĉirkaŭe 76°-78° super la ekvatoro. Tie, en tiu malvarmega regiono, longa je tri cent kilometroj, ekzistas gento el *Eskimoj*, kalkulanta proksimume du cent personojn dissematajn en grupoj el dekkvin aŭ dudek. Jen estas niaj gefratoj, kies morojn, vivadon, k. t. p. la legantoj plezure ekscios.

Tion rakontis (1) la Norvega kapitano *Isachsen*, kiu ĵus faris esploradon (dum 1898-1902), per la fortika ŝipo « *Fram* » bone konata. *Fram* estis unue la ŝipo de *Nansen*, la fama esploristo, kiu pleje alproksimiĝis al la norda Poluso. (86° 13' en 1895) (La itala duko *des Abruzzes* en 1900<sup>a</sup>: 86° 33').

Kapitano *Isachsen* travintranta de unu jaro, Eskimon renkontis sur la glacio kun liaj hundoj kaj lia glitveturilo. La Groenlandano havis koloran vizaĝon, kiu pruvis, ke la haŭto neniam de l'akvo estis tuŝita. Liaj pendantaj haroj estas ebonaj, kaj

blankegaj liaj dentoj. Kiel mallonga pantalono blankursan felon; li havas kiel botoj, fokan felon. La Norvegaj maristoj lin invitis al la tagmanĝo. *Kologtenva* (la nomo de tiu ĉi) sidiĝis kaj komence provis uzi la manĝilaron, sed baldaŭ li prenis sian viandaĵon per la primitiva forketo. Grandapetite manĝante interkonatiĝis l'Eskimo kaj l'anoj de l'ekspedicio. Kompreneble la Norvegoj nesciis la lingvon malfacilan kaj malsimplan de l'enlandulo kaj *Esperanto* ankoraŭ ne estas atinginta la neĝan Groenlandon. Tial ili uzis sukcese gestolingvon, la universalan kaj ĉie komprenatan lingvon. Poste *Kologtenva* scivole la ŝipon vizitis kaj, kun profunda malestimo por ĉiuj komfortoj de la civilizacio, pace dormis sur la ferdeko. Matene li forglitveturis krakigante sian vipon.

Kiam la Groenlandano reeniris hejmen, li sendube rakontis sian vojaĝon, montris la ricevitajn donacojn kaj, iom post iom, ĉiuj la gelandanoj, malgraŭ pli ol du cent kilometroj, alvenis por viziti la blankajn eksterordinarajn fremdulojn. Bedaŭrinde ili ĉiufoje dissendis grasan odoron malagrablan kaj senĉesan.

(1) *Petermann's mittheilungen. Helft VII, 1903. — Revue de Géographie, juin 1905.*

La « malforta sekso », kies vestaro estas simila al tiu de la viroj, ankaŭ estis bone riprezentata. Kelkaj virinoj, tie kiel ĉie, estas beletaj, gajaj kaj koketemaj, sed nebeltaliaj; ili amasigas sian hararon kiel vera fungo. La edziniĝo estas tute simpla. Se junulo kapabliĝis elnutri idaron, li petas la gepatrojn de eskima fraŭlino, ke ili bonvolu ŝin al li donaci. Post la jeso, tuj li kondukas ŝin en sian kajuton. Finita la afero! Se junulo estas lerta ĉasisto, li prenos du kaj eĉ tri edzinojn. Kontraŭe se junulo estas nature mallaborema, li maljuna fraŭlo fariĝos. Aliparte la Eskimoj ne estas multinfanaj. Tre malofte ili naskas tri aŭ kvar infanojn. Tio estas komprenebla en glacia dezerta regiono, kie la nutraĵo estas malfacile akirebla kaj la kondiĉoj de la vivo tute maloportunaj. Tamen la gepatroj multe amas siajn geknabojn, kaj nenio estas pli ridinda ol vidi la patrinon frotantan sian nazon kontraŭ la infanetan nazon laŭmaniere de kiso.

La ĉasado estas la preskaŭ ĉiutaga ago de Eskimoj. Kelkaj el ili posedas malnovan pafilon kun ŝtonaj aŭ osteaj kugloj. Ofte ili utiligas la saman kuglon kaj *Kologtenva* al ni vidigis unu kuglon kiu mortigis sep hordajn cervojn. Sed pli ofte, pro la manko je pulvo, ili uzas la harpunon, la pikilon, la sagon.

Kutime, la hundoj flarinte fokon kaj alkurinte apud la truon faritan por la spirado, la ĉasisto senmova patience la momenton atendas. Tuj kiam la foka kapo aperas ekster la ondo, li harpunas lerte la beston kaj poste altiras la kaptaĵon sur la glacian. Alifoje, ĉasi urson estas kiel eble plej granda ĝojo. La hundaro bojas, rapidegas disjetante neĝ-

turniĝojn, dum l'Eskimo bruegas per kriadoj kaj vipbatadoj. Je cent metroj de la urso, li tranĉas la rimenojn de la glitveturilo kaj la hundoj ĉiuflanke la beston atakas. Tiam dume, la ĉasisto profunde per la lanco ĝin pikas. La pereigo de urso estas vera festo por ĉiuj kaj ankaŭ festena tago.

La kajutoj estas aŭ rondaj aŭ kvadrataj kaj je 1<sup>m</sup>50—2<sup>m</sup> altaj, duone en la tero. Oni enpenetras per malgranda subtervojo longa kvar aŭ kvin metrojn. Dank'al tio oni konservas varman aeron, sed oni baras la lumon. La lumo kaj la kuirado de mangajoj estas farataj per lampo formita el ŝtono kavigita kaj plenigita je graso oleo. La meblaro konsistas nur el feloj, ĉasilaro k. t. p. Intermiksita vivas la familio kaj la hundaro. Vintre la viroj estas ne okupataj. Kontraŭe la virinoj senĉese la felojn maĉas por ilin tani kaj sekve estas tute nebabilemaj!

La aĝon de Eskimoj oni ne povas facile koni. Ili, ja, per la fingroj de manoj kaj de piedoj nur povas kalkuli ĝis dudek. Poste, ili elparolas la vorton: *multe*.

En tiu-ĉi malproksima lando nenio pri la propreco, la antaŭzorgeco. Simplega ŝajnas la religio. Se la vetero estas bela, ĉio estas bona. Se la ventego bruegas en la glacia montaro, la naivuloj pensas ke la Dio « Thornarsuk » kantas.

Resume, tiu gento, alian ekzistadon ne konanta, feliĉa ŝajnas. Unu post alia la necivilizitaj popoloj malaperas sur la mondsupraĵo. Baldaŭ eble ni devos vojaĝi norde de la Polusa Rondo por trovi la lastajn riprezentantojn de la lasta lando virga, netuŝita de la civilizacio.

Profesoro BORD.




### Pri la krozado de Duko de Orleans.

La 23<sup>an</sup> de aŭg. eniris malrapide en la havenon de Reykjavik norvega ŝipo nomita *Belgica*. Baldaŭ audiĝis, ke ĝi portus iun grand-sinjoron, sed malmultaj sciis, ke li estas *Filipo duko de Orleans*, pretendanto al la franca krono. Li estis forlasinta Norveĝon du monatoj antaŭe por esplori la polusajn landojn. Li vizitis Spitzberg'on kaj poste la orientan bordon de Groenlando kaj alvenis tien al la 19<sup>a</sup> grado, kie neniu Eŭropano antaŭe metis sian piedon. Tiu ĉi nova lando estis nomata la « franca lando » kaj iu pinto prenis la nomon de P duko kaj estis nomata kap Filip. La duko mem estis, laŭ diro, pafinta 14 polusajn ursojn kaj 2 rosmarojn. La sekvantan tagon post la alveno al Reykjavik, la duko rajdis kun kelkaj el siaj akompanantoj al la plej famaj turistaj lokoj en la najbaraĵo: la ebenaĵo de *Thingvellir* (kie sidis la antikva islanda parlamento 930-1800), la mond fama *Geysir* (spruĉfontego) kaj la bela akvofalo *Gullfoss* (ora akvofalo).

Poste li forlasis Islandon tiel same trankvile kaj senbrue kiel li venis.

THORSTEIN THORSTEINSSON  
el Reykjavik, Islando.



### Ameriko : Kurioza hejtada rimedo.

Diversfoje oni organizis ĉe Unuigitaj Ŝtatoj publikajn hejtilegojn per akvo varmigita en kaldronego. Sed la ideon uzi varman naturan akvon liveratan de P' granda tera kaldronego ne ankoraŭ havis la inĝenieroj. Jus al ili ĝi alvenis per la jena originala maniero kaj de nun la subteraj fontoj, vintre estas uzataj por hejti la urbon Boise.

Boise estas nerimarkinda urbanomo. Oni estus preferinta ion pli priparolitan, pli faman por la devenloko de provo de tia neordinara hejtado. Sed ni estas devigataj akcepti la aĵojn tiajn, kiaj ili estas.

Cetere Boise estas ĉefurbo de l' Ŝtato Idaoh en Unuigitaj Ŝtatoj kaj la geografistoj diras, ke ĝi enhavas 15 milojn da loĝantoj.

Terure malvarmegiĝas, vintre, en Boise: la neĝfaloj estas grandegaj kaj ofte la termometro 30 aŭ 35 centigradajn gradojn sub nulo.

La kolonelo Henry C. Demming, kiu loĝas en tiu Siberujeto, rimarkis ke varmaj fontoj estas subtere. Tuj li decidis, tre logika, ke oni tuj utiligos ilian varmecon.

Pro tio, kvar sondaputoj estis borataj; la unua, profunda 30 metrojn, liveris akvon je kvindek centigradaj gradoj; alia 375 metrojn donis akvon je 62 gr. 5; tria suprenigis je 450 metroj akvon je 70 gr.; fine la lasta borita ĝis 61 metroj liveris akvon bolan. Ja kuriozaj estas tiuj akvujoj sidantaj unuj super la aliaj kun malsamaj varmgradoj; kaj, kredeble, treege vulkana estas tiu regiono.


Kio ajn estu, nune la urbo Boise nur bezonas turnigi kranojn por ricevi per plena faŭko varman akvon, tiom kiom ĝi deziras.

Oni lavas la domojn per varma akvo, oni surverŝas la stratojn kaj ĝardenojn per varma akvo; ĉie estas varma akvo. La vegetado ĉarmita fariĝis belega kaj nun Boise estas la granda oazo en la Ŝtato Idaoh.

Jen kio okazas, kiam oni havas bonan ideon kaj precipe kiam oni ĝin decide kaj lerte utiligas.

Laŭ MAX DE NANSOUTY (Le Temps)

Tradukis BAISSAC, el Konstantino.



— Nokta ofero. —

Ko irajto.

John Lundgren des.

## La vintromeza sunfesto <sup>(1)</sup>.

Originala rakonto de JOHN LUNDGREN, el Hedemora (Svedujo).

La tagoj mallongiĝas, kiam la luma norda somero ĉesis. La Mallumeco vastigas sian regnon, kaj tuta pereco de l' Suno ŝajnas proksima. Sed la batalo ŝanĝiĝas, la Suno revigliĝas kaj komencas ree sian venkiradon. Por esprimi ĝojon pro naskiĝo de l' novjara Suno la antikvaj Skandinavoĵ en tiu ĉi parto de l' jaro festis sian grandan vintromezan sunfeston.

La Suno ne donas nur lumon, sed ankaŭ bonan kreskadon. Tial *Odeno* ordonis, ke oni ĉe la vintromeza festo oferu por bona rikolto en tiu nova jaro, kies komencon oni kalkulis de tiu ĉi festo.

La penso pri tia palpebla profito iom post iom forigis la memoron pri la devena kaŭzo de la vintromeza festo, same kiel oni en pli malfruaj tempoj ofte forgesis pro kristnaskaj donacoj la signifon de la kristnaska festo.

La praskandinavoĵ festis sian vintromezan feston en « la akcipitra nokto », ĉirkaŭ du semajnoj post la plej mallonga tago de l' jaro. La festenoj estis ligataj kun sangaj oferoj al dio de la Suno.

La vintra ofero estis la plej grava oferfestoj de l' jaro, sed en ĉiu naŭa jaro oni festis ilin kun ankoraŭ pli granda soleneco. En *Lepre*, la ĉefa oferejo de Danujo, oni tiam oferis al siaj dioj 99 homojn kaj samajn nombrojn da ĉevaloj, da hundoj kaj da kokoj, lastdiritajn anstataŭ akcipitroj. Ankaŭ en la ĉefa sveda sanktejo, *Upsala*, estis grandaj oferoj en ĉiu naŭa jaro, kiam homoj tienvenis el ĉiuj svedaj provincoj. Homoj, kune kun ĉevaloj, hundoj kaj aliaj bestoj, estis oferataj, naŭ el ĉiu speco, ĉiuj viraj, per kies sango oni laŭ kutimo pacemigis la diojn. La korpojn oni pendigis en arbareton proksime de l' templo. La sangaj oferoj tamen ne malhelpis, ke oni gaje festenas per manĝado kaj trinkado, kaj « trinki vintran mezon » estis kutima esprimo.

Kiel la antikvaj nordanoj, ankaŭ sudaj nacioj ĝojfestis la pliiĝon de l' Suno.

Kiam la krista eklezio etendiĝis en la Roma regno, oni komprenis, ke la vintra sunfestoj estas tre enradikita en la popolajn sentojn, kaj apenaŭ estas ekstermebla. Do oni uzis por la idolista sunfestoj

(1) Resumo el artikolo de Profesoro Oscar Montelius.



saman rimedon, kiel oni uzis en multaj aliaj cirkonstancoj. Kiel kristaj sanktuloj heredis ecojn kaj trajtojn de mitaj dioj kaj diinoj, la malnovaj festoj ankaŭ estis konservataj kun kristaj signifoj.

Antaŭ ol oni akceptis la kristan kredon, oni meze de la vintro solenis naskigon de la Suno. Poste oni solenis tiun tagon, kiam « la vera Suno », « la Suno de l' justeco » venis en la mondon. Ĉar la verkoj de la Nova Testamento diras nenion pri tiu parto de la jaro, kiam Kristo naskiĝis, oni des pli facile povis fari tiel.


En antaŭkrista epoko la sunfestoj estis noktaj oferfestoj. La ĝis nia tempo konservitaj fajrofestoj vintra, printempa kaj somermeza, ĉiuj antikvaj sunfestoj, atestas tion ĉi. En protestantaj landoj la frua matenmeso ankoraŭ estas la plej brila parto de la

kristnaska festo, kiam riĉa kandelornamo de la preĝejoj, kaj nekalkuleblaj torĉoj, kiuj gvidas tien-rapidantajn homaretojn, penas lumigi la nokton.

Per siaj ordonoj pri la « kristnaska paco », la svedaj mezepokaj leĝoj montras, ke la vintromeza festo estis plej eminenta el ĉiuj festoj de la jaro. Kvankam Pasko laŭ krista konfeso devus esti pli grava ol Kristnasko, unu el tiuj leĝoj tamen ordonis, ke kristnaska paco daŭru tri semajnojn, sed paska paco nur de la antaŭpaska merkredo ĝis pasktaga vespero, do nur duonan semajnon. Tiu, kiu rompis iun el tiuj pacoj, devis pagi monan punon ambaŭ al la episkopo kaj al la kantono.

*Originale verkita de*

JOHN LUNDGREN (Svedujo).



## Kristnaska nokto.

Originale verkita de P. HEDSTROM el Rossön (Svedujo).

Estas kristnaska festo en Vintrolando. Malproksime de l' bruado de l' arboj, inter seriozaj arbaroj, kie montegoj kiel mutaj gardostarantoj ĉirkaŭas la malgrandajn vilaĝojn, kie naturo mem festas revenon de la lumo; tie regas sankta silento: Lagoj kaj riveroj dormadas sub metrodika glacia kavraĵo; per frosto estas malmoligitaj ĉiu rivereto kaj akvofalo. La arbaro briletas de kristalo; arĝentblanko neĝas.

Ne multe estas dirinde pri la loĝantoj kaj moroj de tia izoletita angulo de la mondo; kutime ilia vivado akordiĝas kun tiu naturo, kiu vidis ilin kreskadi, senbruaĵn kaj ĉiam kontentemajn.

Tamen, kiam kristnaska antaŭvespero alproksimiĝas, kaj kvankam frostnebuloj malofte permesas radiojn de l' Suno, ĉion vigligantajn, aperi; tiam, ne nur infanoj kaj gejunuloj, sed ankaŭ maturaj homoj kaj gemaljunuloj preparas sin por soleni feston de infanoj kaj de amo: la kristnaska festo.

....La horon trian posttagmeze. La mallumo jam kovras la teron. Post kadroj en ĉiuj vilaĝaj domoj, bruladas kandeloj, kies briloj nur malfacile atingas kaj avare lumigas la senhomajn vilaĝvojojn.

Pli efika lumfluo travenas fenestrojn de tiu lignekonstruita preĝejo, sur monteto staranta. Ekbatas ĝiaj sonoriloj; sonorado skuas la malvarmegajn noktajojn; la vespera diservo komencas.

Sur vojoj aperas homoj kun piaz seriozaj mienoj; are ili iras partopreni la komencon de l' Kristnaskosolenoj.

Jam antaŭ l' irado preĝejon, la « kristnaska abio » estas ornamita, dome: lertaj manoj de infanoj, metis sur ĝian branĉaron kandelingeitojn kun kandeloj, arĝentfadenojn, pomojn, konfitajojn, kaj ĉiun akireblan provizojn—kaj dolĉaĵon. Post reveno de l'

vespera diservo, la infanaro iom bruetanta ĉirkaŭas la arbon.

Jen, oni jam ekflamigas la sur-abiajn kandletojn; la momento por ĝojiĝo de l' infanoj estas veninta.

Jam post iom da tempo misteraj ridetoj ekaperas sur vizaĝo de unu aŭ de alia infano; kion okazas? — Subite la pardo ekmalfermiĝas. En la malfermaĵo, dum kelkaj sekundoj, vidiĝas homomano tenantan paketaĵojn; en mallonga momento la paketaĵoj estas disĵetitaj inter surprizitajn infanojn; la mano malaperas, kaj la pordo samtempe estas fermata (1). La surprizo tute ne senmovigas infanojn, sed bravulo, fulmorapide, kuras tra pordo eksteren; lia intenco ŝajne estas kapti la ĵetinton de l' paketaĵoj; se li sukcesos, ili ambaŭ gaje revenos, kaj, la kaptito estos amike gastigata.

Estas frua matenhoru. Ree flamas kaj brilas post la vilaĝdomaj kadroj kaj la preĝeja fenestro; ree sonorado tremigas aeron. Bruo aŭdiĝas, ĉar pli da homoj ol la antaŭan vesperon aliras amase matenmeson. La neĝo grincas sub glitveturiloj trenataj de ĉevaloj per sonoriletoj ornamitaj, kaj blekantaj pro la tranĉa malvarmo. Kelkaj piedirantoj portas torĉojn, kies malkonstanta brilo fantazie lumigas al vico da hamoj sin movantaj sur vojo al la preĝejo. Estante tie, en sanktejo lumigita per kandeloj, oni sciigas kiel jam de centjaroj sonis: « Virgulino naskis infanon hodiaŭ » k. c. (2). Kiam, post kelkaj horoj, aperas la unuaj grizaj radioj de l' taglumo en Vintrolando, tiam la meso finiĝas.

*Por «Tra la Mondo»*

de P. H.

(1) *Malnova sveda kutimo laŭ kiu, tiamaniere, dum kristnaska vespero, oni donacas amike ion al iu.*

(2) *El sveda eklezia kantararo.*



LASTAJ MEMORAĴOJ DE L' BULONJA KONGRESO

1. Manpremo ja gajnita — 2. Ce S<sup>o</sup>, Dolain (kl. Lefebvre), — 3. Foriro el Dovero (kl. de D<sup>o</sup> Dor, el Liono).

## La fino de l' Kongreso : En Kaleso de AUGŬSTO MONTROSIER.

Ĉirkaŭ duono de la dua posttagmeze, la vaporŝipo alvenas en havenon Kalesan post bonega marveturo. La verda stelo estas denove frapata je l' supro de l' ĉefmasto, je l' granda miro de l' ne esperantistaj ĉeestantoj.

Multaj kalesaj Esperantistoj atendas siajn amikojn revenantajn de Anglujo : Malpleniginte pokalon da Ĉampano en la stacidoma bufedo kaj aŭdinte korajn alparolojn de l' Urbestro de Kaleso kaj de D<sup>o</sup> Guyot, l'atabla Pr<sup>o</sup> de l' grupo, kiu rememorigas la festojn de l' pasintjara kalesa kongreseto, ĉiuj aliras la komercan ĉambron. Tie, la Prezidanto malestante, la Vic-Prezidanto diras unufoje plie, en vortoj bonegaj kaj ofte aplaŭdataj, la intimajn rilatojn kunigantajn Esperanton kaj komercon, aparte la tulan komercon, gloron kaj prosperfontanon por la urbo Kalesa. S<sup>o</sup> Perrin, la sindona sekretario de l' grupo iĝas tradukanto.

Belegaj floroj estas donacataj al la virinoj, de Kalesanino sin vestinta per la interesa tiea kostumo; kaj ĉiuj eliras ĉarmitaj de tia kora kaj gracia akcepto.

Kun standardo antaŭe, la Esperantistoj aliras tiam la teatron, trapaŝante la urbon, kiu ne forgesis la belajn festojn de 1905. Admirinte la belan disponon kaj la ornamaron de tiu spektaklejo, elpensita laŭ la plej modernaj konoj, kaj fotografiiginte grupe, la ĝoja anaro disiĝas por viziti kelkajn fabrikejojn de tulo.

Oni petas min afable akompani la Doktoron por klarigi al li la funkciadon de l' maŝinoj, iĝante tradukanton. Sed, antaŭe, ni iras ĉe la tre afablan S<sup>on</sup> Dolain, prezidanton de la komerca juĝistaro, kiu tre gaste proponas manĝeton al D<sup>o</sup> Zamenhof.

Oni parolas gaje; la Doktoro kaj lia edzino estas tute ĉarmataj de la kora akcepto de la urbo kalaisa, kun kiu konsentis la vetero por festi la majstron. La supra fotografajo estos por la partoprenintoj en tiu intima kunveno, ŝatinda memoraĵo de tiuj neforgeseblaj momentoj.

Post la alveno en la tulfabrikejon de S<sup>o</sup> Dolain, mia malfacila rolo komencas.

Mi penadas antaŭe kompreni la funkciadon de l' maŝinoj, sed en kelkaj minutoj, tio estas preskaŭ

1. De Zamenhof dankas Sinjorinon Bergier, la sindonan Vic-prezidantinon de l' Bulonja grupo, lertan profesorinon de S<sup>o</sup> Farjon.  
2. Malantaŭ ĝesinoroj Zamenhof staras, de maldekstre dekstren : S<sup>oj</sup> Gaston Moch, D<sup>o</sup> de « Espero Pacifista »; Pr<sup>o</sup> Otto Simon, el Ung Hradiš, kunlaboranto de « Tra la Mondo »; Alfred H. Fried, el Berlino ano de l' Internacia Instituto por la paco; Eloy Dolain, Pr<sup>o</sup>, de l' komerca kalais'a juĝistaro; Ludoviko Rucar, M. Carpenle, komitatoj de l' kalaisa grupo; Aŭgusto Montrosier.  
3. Foriro el Dovero al Kales'o : maldekstre, S<sup>o</sup> Blondel, el Konakri (Franca Gvineo); dorse vidata, D<sup>o</sup> Guyot, Pr<sup>o</sup>, de l' Kales'a grupo.

neebla, kaj kiam mia rolo de kondukanto komencas, mi devas konfesi al Doktoro, ke mi penados klarigi ion, kion mi ne tre bone komprenas!

La maŝino memorigas tiun legendan aparaton en kiun oni metas vivan kuniklon ĉe unu ekstremajo, kaj kiu liveras, ĉe la alia, felan ĉapelon!

Tie ĉi oni vidas milojn da fadenoj movigitaj kaj intermiksitaj de alterna irado de longaj horizontalaj stangoj, kiuj mem estas movigitaj de meĥanismo komandata de pingloj, kiuj eniĝas, aŭ ne, en truojn de grandaj kartonoj tra boritaj laŭ arango rilatanta la desegnon de la punto fabrikota.

La maŝino, sur kiu estas envolvitaj la kartonoj, estas la « Jacquard », tiel nomita per la nomo de l' genia elpensito.

Speciala kombilego paralela je l' stangoj kombinas iliajn movadojn, kaj iom post iom la tulo fariĝas. Estas vere kurioze vidi kiel la multaj dentoj de l' kombilo kvazaŭ mordas la fadenojn laŭ movoj tiel precizaj kaj delikataj, ke neniu rompo de l' maldika ŝtofo okazas.

Post vizito de l' desegnejo, de l' laborejoj en kiuj la punto estas senigata de l' fadeneroj malprave restantaj, kaj poste envolvita sur bliajn kartonojn, ni eliras post kiam S<sup>o</sup> Dolain donacis al Sinjorino Zamenhof kiel memoraĵo de la honoro al li farita de l' Doktoro, metrarojn el diversaj punktoj.

Je la 7<sup>a</sup> kaj duona horo, vespermanĝo en la Kazino.

Doktoro Guyot sidas apud sia glora kolego; kontraŭ ili prezidas ĉe l' alia rando de l' tablo,

Sino Zamenhof, kiu, post sia edzo, alparolos kelkajn vortojn, naturajn kaj korajn, kiam venos la tempo de l' toastoj.



EN KALES'O.

1. Akcepto de D<sup>o</sup> Zamenhof en Kales'o. 2. Ĉe esperanta kafejo.

Kl. Pourcines.

de Schumann kaj arion de Faust.

La publiko tre interesata aŭskultis atente tiujn deklamaĵojn, multe plaŭdatajn, per kiuj finiĝis, tiel bone kiel ili komencis la neforgeseblaj festoj de l' kongreso.

Je l'alveno en Bulonjo, bruegis lastfoje la « vivat »-oj ĉe l' pordo de l' amiko Michaux, dum kiam interŝanĝis lastaj amikaj paroloj, lastaj koraj manpremoj.

A. MONTROSIER.

### Ankoraŭ du kuriozaj anglaj kutimoj kristnaskaj.

En la nokto de la festo de S<sup>o</sup>. Tomaso, la 21<sup>am</sup>, la fraŭlinoj kutimis peni antaŭvidi sian estontan edzon, envolvante bulbon en puran naztukon, metante ĝin sub sian kapkusenon, kaj dirante :

« Bona S<sup>ta</sup>. Tomaso, servu min bone,  
Nokte venigu mian amoton;  
Ke mi lin povu vidi vizaĝe,  
Kaj lin ĉirkaŭpreni per amaj brakoj. »

Ĉe Tainton, Oxfordshire, en tiu ĉi tago, antaŭ multaj jaroj, viro ordonis testamente ke oni uzu

unu sakon da hordefaruno por fari malgrandajn bulkojn, kiujn oni devos disdoni al la malriĉaj infanoj de la paroĥo. Tiu estas ĉiujare farata, kaj speciala prediko estas ankaŭ farata, por kiu la predikanto ricevas ses ŝilingojn kaj ok pencojn.

c. w. o.

*Ni tre plezure ricevas diverslandajn kutimajn priskribojn, rilatantajn festojn ĝeneralajn kiel kristnasko, aŭ specialajn. Aparte dankaj ni estas pro sendoj akompanataj de artaj desegnaĵoj tiaj, kiaj tiuj de Fr<sup>no</sup> Oxenfort kaj S<sup>o</sup> Lundgren.*

(1) De maldekstre dekstren: S<sup>oj</sup> A. Carpentier; Noyon. I<sup>a</sup> Helpanto de l' Urbestro (Dorse vidata); D<sup>o</sup> Guyot; S<sup>o</sup> Hoskisson.  
(2) De maldekstre dekstren: S<sup>oj</sup> Galard, Prez<sup>o</sup> de l' Angers'a grupo; Leonce Bernard, Prez<sup>o</sup> de l' Asocio de l' Tulfabrikistoj; Broca, kolegiestro; D<sup>o</sup> Guyot, Prez<sup>o</sup> de l' Kalesa grupo; S<sup>oj</sup> Deligny, Sek<sup>o</sup>, kaj Bernard, ano de l' grupo de S<sup>o</sup> Omer; Avilov, el Tjstis; E. Pannier, Kalesa komitatano.

En la diversnacia gazetaro. — Nia devo rilatanta la propagandaj kaj esperantaj revuoj. — Tiuj revuoj ne devas interkonkurenci unu la alian. — Organiza kaj lingva komitatoj.

Lastajn elojn de l' Bulonja Kongreso alportas al ni la gazetoj, ĉu niaj bonegaj specialaj revuoj, ĉu iaj nacilingvaj folioj kaj magazenoj. — Inter tiuj lastaj ni citu « Caledonian Jottings » kaj « Review of Reviews », kiuj enpresis longajn artikolojn pri la kongreso.

Sed, ho ve! kvankam mi lernadis la anglan lingvon de 8 ĝis 13 jaroj, mi tute ne povas flue ĝin legi. Mia sindona kunlaboranto, S<sup>o</sup> Gambier, afable resumis jene la artikolon de « Review of Reviews », verkitan de la tutmonde fama S<sup>o</sup> Stead, redaktoro de tiu grava revuo.

« La Hungaroj, li diras, kontraŭstaras la uzadon de la germana lingvo kiel militista lingvo por la hungara armeo; la hungara lingvo estas pelata, sed Vieno ne volas. Ĉu Esperanto ne povus alporti solvon? Tial ke la du rasoj ne volas akcepti unu aŭ la alian el tiuj du lingvoj kiel la « Lingua Franca » de la armeo, kial ne uzi Esperanton kaj fari militistan leksikonon je tri lingvoj Germana, Esperanta, Hungara? Grava eŭropa krizo povus esti tiel evitata.

Poste S<sup>o</sup> Stead priskribas la biografion de D<sup>o</sup> Zamenhof; kia maniere la Doktoro elpensis sian ĝerman lingvon, rimarkinte ke la malsmileco de lingvoj estas la signo, se ne la kaŭzo de la malpacoj kiuj okazis ĉe la kvar rasoj kiuj loĝas Bjelostokon (Rusa, Pola, Germana, Hebra).

En tiu urbo, tuj de sia infaneco li estis lerninta la vortojn: Frateco, Humaneco, li pensis ke la konfuzeco de la lingvoj estas la Antekristo de l' mondo.

Samtempe kun tiu abomena vidaĵo, li profetas la venkon. Ni ĉiuj konas la sortovicojn kiuj okazis pri Esperanto, sed ĉiam li kuraĝe batalis, kaj hodiaŭ li triumfas, humile.

Sed diras la malamikoj de Esperanto: tiu ĉi lingvo ne nur detruos la naciajn sed nenigos la patriotismon. Tute kontraŭe la lernado de Esperanto tre utilas por stimuli tiujn, kiuj penas por revivigi la dialektojn kiuj iom post iom mortiĝas.

La Kongreso de Bulonjo kiu sukcesis super ĉiu espero « fermas la buŝon » de la malamikoj de Esperanto. Dank' al Esperanto, ĉiuj nacioj fariĝas amikoj por la plej granda bono al la frateco kaj al la homaro, kiel ankaŭ por la plej granda gloro al D<sup>o</sup> Zamenhof ».

Laŭ S<sup>o</sup> W. F. STEAD,

Redaktoro de « Review of Reviews ».

Artikolo franca en « Le bon citoyen de Tarare », (la bona urbano de Tarare) meritis ankaŭ specialan citon. La aŭtoro S<sup>o</sup> Cherblanc, kiu raportis pri Esperanto en gazeton « Journal », parolas ankaŭ bonege pri nia afero. Sed tio, kion mi volas aparte rimarkigi estas tre bontrojta iniciativo. Ĉiu vorto, ĉiu frazo esperantaj cititaj en la artikolo estas akompanataj de sia elparolo per francaj sonoj, tiamaniere ke la legantoj iom post iom, ne ĝin imagante, lernas la elparolon per komparo.

Tiu farmaniero estas tre rekomendinda al tiuj, kiuj verkas propagandajn nacilingvajn artikolojn. Kontraŭe agante, oni riskas ridigi kaj moki la lingvon, kiun, tute kontraŭe, oni volas ŝatigi.

Do, ni limitu S<sup>o</sup> Cherblanc, kaj ni povos sendanĝere enkonduki, kaj pli kaj pli, esperantajn tekstojn en niajn artikolojn.

Aliaĵo, ankoraŭ, igas atentinda la preparolatan artikolon. Tute prave, la aŭtoro ĝojigas vidinte kelkajn komercistojn elmontri esperantajn komercaĵojn en la kongresan ekspozicion ĉar, li diras, komercio povas multe por divastigo de Esperanto, kiam ĝi estos kompreninta ĝian gravecon por pli facilaj komercaj interrilatoj.

Malfeliĉe tro malmultaj estas ankoraŭ la produktoj je la fabrikmarko « Esperanto ». La kulpo estas iom nia, ĉar, eble, Esperantistoj ne sufiĉe kaj prefere aĉetas tiajn komercaĵojn. Tro da ili, sendube, pensas kiel persono kiu, vizitante kun mi la esperantan ekspozicion komercan diris al mi. Kion tio signifas?... kaj tiu persono estas tamen komitatano de grupo!!! Li ne komprenis, ke estas por ni la plej ŝatinda reklamilo vidigi sur aŝoj, skatoloj, surskribajetoj, en reklama fako de ĵurnaloj, sur la manĝotabulo, en fumejo, en tualetejo, k. t. p. la nomon « Esperanto ».

Kaj tiu fakto, ke jam kelkaj komercistoj kuraĝas uzi Esperanton por sia negoco devus certigi al ili mendojn de ĉiuj Esperantistoj.

Estas ĝuste diri ankaŭ ke kelkaj, eĉ la plimulto de tiuj komercistoj, farinte provon haltas tie, kaj faras nenion por ĝin konigi. Ili kontentiĝas per la senpaga anonco enpresita en la propagandajn gazetojn kaj nenion plu aldonas por la diskonigo de sia produkto: El la sufiĉe multaj komercaĵoj elmontritaj en la Bulonja ekspozicio, ne unu reklamas en niajn revuojn!

Sed tio ne senkulpigas tiujn el ni, kiuj flankklasas esperantajn, ne komprenante ke devo de vera Esperantisto estas aĉeti ilin prefere je simila ne esperanta.

Ĉu oni ne legis en la plej disvastigita el niaj revuoj strangan artikolon en kiu la aŭtoro penadis disbati ĉiujn argumentojn de propagandistoj: Esperanto havas gravecon nek por komercio, nek por sciencoj, nek por turistoj nek por interrilatoj!

Por kio do, vi demandas vin, homo laboradis multajn jarojn, kaj aliaj stranguloj penadas konigi kaj disvastigi la frukton de tiom da laboroj?

Estas nur por konigi la fremdajn literaturajn verkojn!! Certe tiu vidpunkto ne estas flanklasinda, kaj estas tre agrable legi en nia kara elekta lingvo verkojn tute ne legeblaj alie, sed vere, ĉu D<sup>o</sup> Zamenhof celis nur tiun trafotajn, kiam li ellaboris sian kreitaĵon.

Almenaŭ, vi pensos ke l' homo kiu, en kelkaj paĝoj el tiel bedaŭrinda fantazio, ruinis la argumentojn, kiujn tiom da sindonaj paroladantoj aŭ verkantoj por Esperanto penadas triumfigi apud skeptikuloj, vi pensos — mi diras — ke tiu homo legas ĉion skribitan esperante, ke li abonas ĉiujn gazetojn, aĉetas ĉiujn librojn.

Grava eraro; li skribas: oni verku, oni traduku, sed li ja detenas sin kuraĝi eldonistojn kaj verkantojn, kiuj agas laŭ liaj konsiloj, alie ol per paroloj!

Tro da Esperantistoj estas similaj al li. Kaj legado de ĉiuj niaj gazetoj estas vere, kaj malĝoje konvinkanta pri tio. Multaj Esperantistoj ne lernas la lingvon, ne vizitas la kursojn nek la kunvenojn de sia grupo, ne interrilatas!

Strangaj Esperantistoj, pli ĝuste Esperantanoj, malveraj Esperantanoj, kiuj ne scias fari la plej malgrandan oferon por sia supozata afero!

Antaŭ hieraŭ en « Espero Katolika », hieraŭ en bonega « L'Espérantiste », pli ĵuse en modernigita « La BELGA SONORO », ni legis la saman alvokon sub diversaj formoj. Ni unuigite ĉar « Unueco donas fortecon » diras la nova « BELGA LIGO ESPERANTISTA », fondita sub prezidanteco de l' agema kaj valora komandanto Lemaire.

Jes, kaj kiel estas eble, ke tia alvoko estas necesa!

Kiel! vi havas pretendite ideon karan, kaj vi nenion volas elspezi por ĝi; « ne eĉ unu kopekon »! Kiel vi volas ke la ideo sukcesu? Revu al gravaj sumoj perditaj ĉiujare nepripense, por aĉetoti senutilaj; kaj sparu iom da tiuj sumoj por via nacia societo, por via nacia propaganda revuo.

Revu pri la utileco de tiuj naciaj revuoj, sen kiuj nenia progreso estas farebla. Memoru pri la bonegaj, kuraĝantaj sciigoj legataj ĉiunumere, pri la armilaj metataj en viajn manojn ĉiu monate: estas aperto de nova grupo en lando ankoraŭ kontraŭa je nia ideo, aŭ multvalora akiro de eminentulo kiu donos apogon grandegan al via propagando, aŭ ĝenerala raporto pri la esperantista movado en difinita tempoperiodo.

Kiu donus al vi tiujn sciigojn, se vi ne havus specialajn naciajn propagandajn revuojn?

Nur dank' al « L'Espérantiste » kaj per sciigoj ĉerpitaj el ĝi, mi faris mian algerian militiron; mi havis nur embarson pro elekto inter la raportoj kaj faktoj cititaj en ĉiu numero, samtempe kiam mi havis por ekspluati riĉan minejon de argumentoj por Esperanto kaj kontraŭ... kontraŭuloj.

Kia profito, kaj kiom ŝatinda por la komencanto kiu mi estis!

Tio, kion mi diras por « l'Espérantiste » estas dirinda por ĉiuj niaj naciaj propagandaj folioj. Ĉiuj estas bonegaj, ĉiuj estas instigitaj de l' plej bona kaj Zamenhofa sento. Sed, ho ve! Ĉiuj ne havas sufiĉe da legantoj; ili vegetas kaj tro ofte mortas. Oni ne diru: estas ilia kulpo, la esperantaj folioj estas tro multaj, kaj kelkfoje ne sufiĉe interesaj kaj direktataj.

Se la naciaj folioj iĝas multaj, estas ĉar Esperanto disvastigis en pli kaj pli multajn landojn. Kiam fondiĝas en Bulgarujo aŭ fondiĝas en Japanujo nova revuo, oni konfidas aŭ konfidos al sannaciuloj por vivigi ĝin kaj per ĝi helpi la esperantan aferon en la lando. Kial do Francioj aŭ Germanoj, Britoj aŭ Hispanoj diras: « ankoraŭ nova revuo; oni tro petas de Esperantistoj! » Ĉu estas Esperantistoj nur en Francujo, Germanujo, Britujo? Kaj kial kelkaj revuoj ekkantas saman arion. Tio ne povas utili nian aferon. Ni estu, kontraŭe, helpemaj por ili, sub la sola kondiĉo ke la novnaskitaj estu konformaj al la Zamenhofaj principoj.

Se la revuoj ne estas tre interesaj, tre lerte verkitaj, ni ne remarkigu la aferon; sed kontraŭe ni penadu havigi al ili legantojn. Aparte, kiuj ĝin povas, tiuj raportu por ili en la lokajn naciajn gazetojn. Kiam mi estis propagandisto, kiom da artikoloj mi faris por « Lingvo internacia »! tradukante artikolojn kaj klarigante la valoron de tiu revuo por la informado.

Ĉiuj, kiuj povas, ĝin faru por sia nacia propagandilo kaj ankaŭ por la partiaj aŭ ĝeneralaj revuoj tiaj kiaj «*Espero paciŝta*», «*Espero katolika*», «*Tra la Mondo*». Ĉar miaj diroj estas ankaŭ aplikeblaj por ili.

Por la lasta parolis jam kelkaj, tre malmultaj, fremdaj revuoj; dankon al ili: al S<sup>oj</sup> Paul Nylen kaj Meazzini. Tiu lasta faris tre favoran raporton en la ilustrata itala revuo «*Il momento illustrato*». En Francujo, 3 artikoloj en parizaj gazetoj kaj revuoj «*Le Figaro*», «*Le Gaulois*», «*L'Illustration*», tiom pli ŝatindaj ke ili estas ŝuldataj al ne Esperantistoj.

Jen estas la traduko de l'artikolo de «*L'Illustration*», afable konigita kaj sendita al ni de S<sup>o</sup> A. Pedroso, kiun ni tre dankas por tio.

«*Tia estas la titolo de ilustrata revuo presita tute per Esperanto kaj kiu, dank' al tiu cirkonstanco, rondiras ĉiam Tra la Mondo. Esperanto ebligas perfekte la eldonon de tia revuo. Kies programo enhavas ĉiujn homajn konojn. Estas tie provo el la plej alto intereso. La personeco de l' ĉefredaktoro, S<sup>o</sup> Augusto Montrosier, kiu faras en «*Les Annales politiques et littéraires*» kurson pri Esperanto tiel rimarkata, ebligas promesi al ĝi belan estonton.*»

L'Illustration.

Ni estas fiera pro la flata opinio de nia granda pariza kunfrato. Povu ĝia antaŭdiro iom ĝustigi.

Ankaŭ kelkaj afablaj vortoj en «*Le Journal de Beaune*».

Ĝis nun, ni ĝin devas konfesi, ni havas nur estimsukceso. Aparte, la grupoj estas tute indiferentaj. Kompreneble ili ne povas aboni ĉiujn revuojn. Pro tio ni donis al ili eblecon ricevi senpage la revuon; sufiĉas ke ili al ni havigu 6 abonojn. Tio ne estas tro por multe da ili. En urbo, ekzemple, kie kursoj kalkulas centojn da lernantoj, ni havas 3 abonantojn. Certe malgranda penado ebligus atingi pli bonan rezulton, kaj havigi por la grupo senpagan abondon; kaj tiu ekzemplo ne estas izola!

Ni ne timas diri ke grupestraroj ne zorgantaj intereson de sia grupo estas kulpaĵ kontraŭ siaj grupanoj. Sed ni lasu tiun malĝojigan temon.

La unua universala esperanta kongreso donas jam fruktojn. Le bonega «*Germana esperantisto*» sciigas nin pri favoraj artikoloj publikigitaj en gazetojn iam skeptikajn aŭ eĉ kontraŭajn.

Same «*Belga Sonorilo*» donas longan nomaron de gazetoj favoraj por nia ideo, tre grava rezultato ĉar, ĝis nun, niaj belgaj amikoj ofte plendis pro indiferenteco de la belga gazetaro.

La revuo, plibonigita kiel formo kaj prezentado, estas nur direktata de D<sup>o</sup> M. Seynaeve (Heule-Courtrai), al kiu oni devas sin turni por ĉiuj ĝeneralaj principaj demandoj koncernantaj la lingvon, la gazetaron, k. t. p. Por transdonoj de abonoj, sendoj de komunikaĵoj kaj manuskriptoj, petoj pri sciigoj, anoncoj, k. t. p., oni sin turnu al S<sup>o</sup> J. Coox, Duffel (Belgujo).

S<sup>o</sup> Jamin, eksredaktoro, tro okupata nun por konservi la pezan ŝarĝon, kiun li prenis sur sin dum du jaroj, daŭrigas tamen sian ŝatindan kunlaboradon en la revuo. Ni kore partoprenas en la tiel meritaj dankoj al li juste donitaj de nia energia kumbatalanto, komandanto Lemaire.

En la revuo ni legas jenon, pri la kongreso Bulonja:

«*Ni intencis reprodukti kelkajn fotografiaĵojn de la kunveno, sed pro diversaj kaŭzoj ni tion ne faros. Ni opinias ke, ĉar ni havas Ilustratan Esperantistan Revuon, niaj legantoj povos aĉeti kaj aboni la tre interesan gazeton «*Tra la Mondo*».*»

Ni tre dankas nian kunfraton, kiu tiel prave liavice alprenas la saman kondukmanieron kiel ni. Ni evitu konkurencojn unu la aliajn. En tiu intenco, kaj por ne konkurencoj literaturajn revuojn, ni nepre ne enpresos versojn.

La amikoj, kiuj afable sendis poeziojn al ni bonvolu ne kolekti pro tio. Se ili ĝin deziras, ni sendos iliajn versojn al aliaj revuoj. Ni volas konservi al «*Tra la Mondo*» ĝian karakteron de ĝenerala ilustrata informado.

Post finiĝo de l' kongreso, kaj laŭ peto de kelkaj personoj, ni faris proponon por donaci al D<sup>o</sup> Zamenhof kaj S<sup>o</sup> Michaux, la rimarkinda Ĉef-Organizinto de l' Kongreso, memoraĵon de l' neforgesegblaj tagoj ĵus vivitaj.

La propono ricevis, kompreneble, tre favoran akcepton, kaj en kelkaj horoj, kotizaĵoj jam gravaj estis rikoltataj. Sed la kolekto estis haltigata de D<sup>o</sup> Zamenhof, kaj oni komunikis al ni, antaŭ kelkaj tagoj, la sekvantan avizon:

«*La komisiitaro, kiu okupis sin pri la memoriga medalo oferota al D<sup>o</sup> Zamenhof kaj al S<sup>o</sup> Michaux dankas la unuajn subskribintojn, sed ĝi estas devigita forlasi sian projekton pro la rifuzo nepre esprimita de l' interesatoj post la maldiskreteco de la*

gazetaro. (La sumoj ricevitaj estos resendataj al donintoj se tiuj lastaj ne diras alian. uzon. Kelkaj manifestaciis la deziron, ke ili estu enspezataj de la kongresa kaso, aliaj de la propaganda kaso: estos farate laŭ ilia deziro.)»

Ankoraŭ grava avizo:

«*La Organiza komitato kaj la Lingva komitato elektitaj de la kongreso, propozore loĝis sian komunan sociaĵon. 51, Rue de Clichy, Paris. Ĉiuj komunikaĵoj iliu koncernantaj devas esti tiamaniere adresataj: Centra oficejo de Esperanto, 51, Rue de Clichy, Paris. Tiu centra oficejaro prenos sur sin la dissendon al kompetentuloj ĉiujn komunikaĵojn al ĝi senditajn.*»

Ni aldonu ke generalo Sebert, malgraŭ siaj multaj personaĵaj okupoj, prenis sur sin, la prezidantecon de l'organiza komitato, dum S<sup>o</sup> Boirac akceptis tiun de l'lingva, kiel ni jam diris en nia dua no. La unua sciigo estas tute aparte grava por la sukceso de nia dua kongreso. Kie ajn ĝi okazos, la konsilioj kaj la sperto de homo el la valoro de G<sup>o</sup> Sebert estos apogo grandega por la organizantoj kaj valora «*ĉefa karto*» en la ludo de Esperantistoj.

La Sekretario de l' centra oficejo estas nia konata kunlaboranto, S<sup>o</sup> Gabriel Chavet.

Gesinjoroj Deshays (Dehe) sciigas nin, *Esperante*, pri la naskiĝo de filo. Komplimentojn al ili kaj gratulojn pro tia propagando.

A. MONTROSIER.

## BIBLIOGRAFIO.

Diverslingva proverbaro, de S<sup>o</sup> Zamenhof; Ŝlosiloj de S<sup>o</sup> Ĉefeĉ; nova instrua verketo de S<sup>o</sup> T. Cart.

Oni sciigas nin pri preparado de oficiala raporto en Esperanto pri la Bulonja Kongreso. Ĝi estus plena verko enhavanta «*in tute*» la diskutojn, kun l'adresaro kaj la ĉefajn fotografiajn. Tamen, pro la amplekso de tiu verko, kies kosto estos ĉirkaŭe 3,50 fr. la preso estos komencata nur se la nombro de subskribintoj tion ebligos. — La mendoj estas riceveblaj ĉe la Bulonja grupo, 26 Rue Wiscoq (Boulogne-sur-mer, France).

En «*Esperanto*» hungara, bonegaj artikoloj de D<sup>o</sup> Martyn Westcott, kies verkeron ni enpresis en tiun numeron; de Boriso Kotzin, laŭ Ĉehov; turkaj kaj svedaj proverboj, k. t. p....

Traduko esperanten de proverboj estas bonega afero. Ĝi ebligas kompari la manieron laŭ kiu sama proverba ideo estas esprimita en diversaj lingvoj, kaj tio estas bonega rimedo por perfektigi en la naciaj lingvoj. Tiel opiniis S<sup>o</sup> F. Zamenhof kiu estis apudmetinta en «*Frazeologio rusa-pola-franca-germana*» proverbojn similajn el tiuj kvar lingvoj. Li havis la bongan ideon plenigi tiun verkon per aparta aldono enhavanta la samajn proverbojn en Esperanto. Kaj por ebligi la komparon, tiuj lastaj estas arangitaj laŭ la sama ordo kiel en la kvarlingva volumo. Ni tre rekomendas tiun verkon al sciemuloj. Estas aparte tre ĝojiga kaj interesa vidi kiel lerte kaj vere internacie S<sup>o</sup> F. Zamenhof esperantigis niajn kutimajn proverbojn.

Por alia kaŭzo tiu libro estas tute rekomendinda al Esperantistoj: ofte, en interparolado, en skriboj, oni citas latinajn aŭ grekajn frazojn, iafoje ankaŭ kelkajn fremdajn esprimojn popularigitajn de uzado.

Bonega propaganda rimedo estus citi samkondiĉe esperantajojn, aparte proverbojn. Tio incitus kuriozecon, demandojn kaj sekve parolojn por Esperanto. Tiun ideon esprimis iam al mi unu el niaj Alĝeriaj samgrupoj, S<sup>o</sup> Brune, el Fouka, al kiu mi volas lasi la tutan meriton.

La verko de S<sup>o</sup> L. Zamenhof estos tre utila por tiuj, kiuj volos provi la aferon, kion ni tre rekomendas. (1) Sed, se oni citas skribe ian esperantan proverbon, oni zorgu aldoni, inter parentezoj, nacian elparolon kiel faras tiel bonege Sinjoro Cherblanc.

Ni ne ankoraŭ havis spacon por paroli pri la ŝlosiloj esperantaj (franca, angla, germana, itala — la rusa kaj sveda estas pretigitaj) de nia angla propagandisto S<sup>o</sup> Ĉefeĉ. Ili estas volumetoj mirinde resumantaj la principojn de Esperanto, kaj enhavantaj plenan vortaron Esperanto-naciatingvo. Tiuj libretoj plenigas admirinde lokon malplena lasitan de la konsumiteco de l' komencaj folioj eldonitaj de D<sup>o</sup> Zamenhof. Ĉar ili pezas nur 5 gramojn, oni povas enmeti tiujn ŝlosilojn en koverton kun letero esperante skribita, kio, ankaŭ, estos tre inda rimedo por montri al nekonoj Esperanton la facilecon kaj praktikecon de la lingvo.

S<sup>o</sup> Cart, kies nomo estas programo, ĵus eldonis ĉe la Presa esperantista societo esperantajn elementojn kaj interparoladajn ekzercojn tre valorajn kiel prepara fundamento por sekvanta lernado. Tiu libreto, kies kosto estas nur 0 fr. 15 estos tre utila por profesoroj de personoj ne tre kleraj. Ni donas en nia paĝo «*miksajoj*» ekvidon pri tiu nova verko.

LEGADAMIKO.

(1) Kompara Frazeologio Rusa-Pola-Franca-Germana»: 1 fr 25; «*Proverbaro esperanta*», aldono al la unua: 0 fr 50. Ĉe la aŭtoro M. F. Zamenhof, str. Nowolipki 43, Varsovio, aŭ ĉe «*Tra la Mondo*».



## Angla Kristnaska mango, De CHARLES DICKENS, esperantigita de MARTYN WESTCOTT.

La sekvanta rakonto plenigas la ĝeneralan artikolon de nia kunlaborantino, fraŭlino Oxenford. Oni vidos ke, laŭ ŝia diro, pudingo ludas gravan rolon en angla kristnaska mango.

Tiam Sinjorino Cratchit levigis; ŝi estis malriĉe vestita, sed gaje dank' al rubandoj diverskoloraj; kaj ŝi, kune kun Belinda, ŝia dua filino, primetis la tablon. Kaj nun enkuris du pli malgrandaj Cratchits (1), geknaboj, kiuj kriis ke ili, ekster la bak-ejo, flaris la anseron kaj ĝin konis kiel ilia propra ansero per la odoro! Ili ĝojis tiel, dancante ĉirkaŭ la tablo, kaj pensante pri salvio, kolbasoj, kaj bulboj, dum Sinjoro Peter Cratchit zorgis pri la terpomoj kaj blovis la fajron, ĝis fine la terpomoj estis pretaj por esti senŝeligataj. Tamen Sinjoreto Peter ne estis tro vanta, kvankam li portis kolumon tre altan por fari honoron al la Tago.

« Kial do via patro tiel malfruas? » diris Sinjorino Cratchit — « kaj via frato, Eta Tim, (2) ankaŭ? Kaj Martha ne tiel malfruis je duonhoron la lastan Kristnaskon! »

« Jen Martha, patrino! » ekriis filineto.

« Jen Martha, patrino! » ekriis la du pli junaj Cratchits.

« Hura! estis tiel granda ansero, Martha! »

« Nu, kiel vi venas malfrue! » kriis Sinjorino Cratchit, ŝin kisante dekufoje, kaj forprenante ŝian ĉapelon kaj ŝalon.

« Ni devis multe labori por fini nian taskon, lastan nokton, » diris la knabino, « kaj matene ni devis ĉion malnegligigi, patrino. »

« Nu! ne estas grave! Sidiĝu antaŭ la fajro, karulino, kaj varmigu vin! »

« Ne! ne! jen patro! » kriis la du junaj Cratchits, kiuj estis ĉie samtempe. « Kaŝu vin, Martha, kaŝu vin! »

Tiam Martha sin kaŝis, kaj la malgranda Bob, la patro, envenis kun almenaŭ tri futoj da lana skarpo pendanta antaŭ li, kaj kun eluzitaj vestoj, flikitaj kaj brositaj, portante Etan Tim'on sur sia ŝultro. Ho ve! Tim (3) havis lam-bastoneton, kaj liaj membroj estis subportataj per fera trabaĵo!

« Ho! kie estas nia Martha! » kriis Bob, ĉirkaŭrigardante.

« Ŝi ne povas veni, » diris la mastrino.

« Ne veni! » ripetis Bob, kaj lia energio subite falis, ĉar revenante hejmen li estis kurinta kiel milita ĉevalo de Eta Tim,.... « Ĉu ŝi ne venos je Kristnasko? »

Martha ne povis elporti lin vidi malkontenta, eĉ nur ŝerce, kaj ŝi tuj elvenis el post la pordo, kaj lin ĉirkaŭprenis; dume, la ambaŭ junaj Cratchits portis Etan Tim'on al la kuirejo, por ke li aŭskultu la pudingon, siblantan en la kaserolo.

« Kaj kiel kondukis Eta Tim? » demandis la mastrino, tuj kiam Bob estis sufiĉe kisinta sian filinon.

« Tre bone, » respondis Bob. « Sed li fariĝas pri-pensa, tial ke li estas tiel ofte sola, kaj li havas la plej strangajn pensojn.... Li diris al mi, revenante, ke li esperas ke oni lin vidis en la preĝejo, ĉar li estas kriplulo kaj tiel oni povis ĝoje memori, je Kristnasko, tiun, kiu igis lamulojn marŝi kaj blindulojn vidi! »

La voĉo de Bob tremis kiam li tion diris, kaj pli forte ankoraŭ kiam li aldonis, ke Eta Tim fortiĝis nun.... La aktiva lam-bastoneto aŭdiĝis sur la planko, kaj Timo revenis, akompanata de sia frato kaj de sia fratino, al la benketo apud la fajro; kaj Bob relevis siajn jakmanikojn (kvazaŭ eble ili povus fariĝi pli eluzitaj, malfeliĉulo!) kaj miksis ion varmegan en kruĉo, movis ĝin per kulero, kaj ĝin metis sur la fajron por boleti. Tiam Sinjoreto Peter kaj la du junaj Cratchits iris por alporti la anseron, kaj baldaŭ revenis en ĝoja procesio!

Tiel multe ili tumultis, ke vi estus pensinta ke ansero estas inter ĉiuj birdoj la plej kurioza; kaj, kompreneble, en tiu dometo ĝi vere estis malofta. Sinjorino Cratchit varmigis la sukron; Sinjoreto Peter forte dispremis la terpomojn; Fraŭlino Belinda sukeris la pomsaŭcon; Martha viŝis la varmajn telerojn; Bob sidigis Etan Tim'on apud lin ĉe la tablo; la du junaj Cratchits metis seĝojn por ĉiuj, por si mem ankaŭ; kaj ili tiam puŝis la kulerojn en sian buŝon por ke ili ne kriu antaŭ ol ili laŭvice estos servitaj.

Fine ĉio estis preta, kaj oni petis la benon de Dio.

(1) Cratchit estas nomo kiu reprezentas la skrapan bruon de la plumo de komizo.

(2) « Tim » estas mallongiĝo de l' nomo Timoteo (angle, Timothy).

Paŭzo sekvis, dum la sinjorino ekzamenis la tranĉilon kaj sin preparis por empuŝi ĝin en la bruston de la birdo kaj kiam ŝi tion faris, kiam la internaĵo, elpuŝiĝis, ĉiuj gajigis, kaj eĉ Eta Tim, ekscitata, batis la tablon per sia tranĉil-tenilo kaj malforte kriis « Hura ! »

Neniam oni vidis tian anseron ! Bob diris, ke li kredas ke neniam tia ansero estos kuirita ! Ĝia moleco kaj gusto, ĝia amplekso kaj ma'kareco, estis temoj de grandega admiro. Kun pomsaŭco kaj terpomoj, ĝi sufiĉis por la tuta familio ; eĉ, kiel la sinjorino ĝoje diris (rigardante unu malgrandetan atomon ostan sur la plado), ili ne ĝin tute formanĝis fine ! Tamen ĉiuj satis.

Sed nun, post kiam la teleroj estis ŝanĝitaj de Fraŭlino Belinda, Sinjorino Cratchit sole forlasis la ĉambron — tro nerva por toleri atestantojn — por iri al la pudingo (1) kaj ĝin enporti...

Ho ! ĉu ĝi estas sufiĉe kuirita ? Ĉu ĝi ne disrompiĝos, kiam ŝi elturnos ĝin ! Ĉu iu ne suprenrampis la muron por ĝin ŝteli, dum ili manĝis la anseron ! Oni imagis ĉiajn specojn de teruraĵoj.....

Ho ! kiom da vaporo ! la pudingo estis eltirata el la kaserolo..... odoro kvazaŭ de lavejo ! tio estis la pudingtuko (2)..... odoro simila al tiu de restoracio, de kukejo kaj de lavejo kune ! tio estis la pudingo !..... Envenis tuj Sinjorino Cratchit, ruĝigante kaj ridetante fiere, kun la pudingo, simila al makuli-

ta kuglego, tiel malmola, brilanta en brando flamanta, kaj ornamita de ileksa branĉo, kiu supre staris.

Ho ! kia mirinda pudingo ! Bob Cratchit diris, kaj tre trankvile, ke li ĝin rigardas kiel la plej granda sukceso de la sinjorino de ilia edziĝo ! Sinjorino Cratchit diris ke, nun kiam ĉio bone okazis, ŝi konfesas ke ŝi ne ĝuste sciis ĉu la kvanto da faruno estos sufiĉa. Ĉiuj ion diris pri tio, sed neniu diris aŭ pensis ke la pudingo estis tro malgranda por granda familio. Estus herezo ĝin fari. Ĉiuj hontus havi tian penson !

Fine la matenmanĝo finiĝis ; oni forportis la tablotukon, balais la fajrejon, kaj revivigis la fajron. Poste la miksaĵo en la kruĉo estas gustumata kaj perfektigata, oni metis pomojn kaj oranĝojn sur la tablon, kaj multe da kaŝtanoj sur ŝovelilon sur la fajro. Tiam la tuta familio sidiĝis ĉirkaŭ la fajro, kaj apud la kubuto de Bob estis la tuta familia glasaro.... du glasoj kaj unu taso sen tenilo. Tamen ili enhavis la kruĉan miksaĵon tiel bone kiel pokaloj oraj

estus ĝin enhavintaj ! kaj Bob disdonis ĝin ĝoje, dum la kaŝtanoj sur la fajro bruege kraketis kaj siblis. Tiam Bob diris : « Mi proponas « Ĝojan Kristnaskon » al ni ĉiuj, miaj karaj ! Dio nin benu ! » Kaj la tuta familio ripetis tion.

« Dio nin benu ! ĉiujn ! » diris Eta Tim, laste.

CHARLES DICKENS.



Eltirita el

« L'Illustration »

ANTAŬ KRISTNASKO.

Butiko de anservendisto gardata de policano (3).

## A CHRISTMAS CAROL (Kristnaska Sonorado).

De Charles Dickens, esperantigita de Martyn Westcott.

Tia estas la titolo de l' verko de l' glora angla aŭtoro, pri kiu estas parolita en nia 3<sup>a</sup> numero, kaj el kiu estas eltirita la intima supra rakonto.

La heroo de l' rakonto, Scrooge, estas ne simpatia : « *Li estas avaraga, Scrooge ! premema, ekstrema, skrapema, kaptema, avida maljuna pekulo ! malmola kaj akra kiel siliko, el kiu neniam ŝtalo aĵo elsaltigis fajrejon malavaran ; sekreta, kaj silentema ; kaj sola kiel ostro* ». Tiu portreto, ja, ne estas flatema. Kaj ĝi ŝajnas meritata ĉar Scrooge havas nenian amikon de la morto de Marley, lia kunulo kaj rajtigito.

Nu, kiam komencas la rakonto, en kristnaska tago, ni vidas Scrooge reenirantan hejmen post kiam li montris kelke da fojoj sian malbonan koron. Alveninta apud la hejman pordon « *kaj tenanta sian ŝlosilon en la pordseruro, li ekvidas en la fra-pilo (sen intermeza ŝanĝo) — ne fratilon, sed la vizaĝon de Marley.* »

Tio estas la komenco de miriga kaj fantazia rakonto en kiu la priskriba kaj rakonta talento de Ch. Dickens plene montriĝas.

La aŭtoro ĉeestigas nin ĉe parolado inter Scrooge kaj mort-

inta Marey, kiu ne multe plu valoris dum lia vivo, kaj kiu aperas sub formo de terura fantomo, ŝargita de peza ĉeno de si mem forĝita.

Post timigaj paroloj kaj gestoj, Marley diras al Scrooge, ke estas por li ankoraŭ tempo por memsavi, sed ke li devas ricevi tri Spiritojn, kiuj eble, donos al li reaĉeton. La intervidiĝo kaj promenado kun la tri Spiritoj ; tiu de l' Pasinta, Estanta Kristnaskoj kaj la tria, kiu ne volas diri sian nomon sed montras al Scrooge la eblan estonton, okupas la paĝojn de l' ĉarma rakonto.

Legu ĝin kaj vi vidos kia bonega homo iĝas Scrooge post pripensigaj lecionoj ricevitaj de la tri spiritoj.

Dum lia vojaĝeto kun la dua Spirito okazas la sceno supre presita, kies intima ĉarmo bonege montras la talenton de l' fama kaj amata (4) angla aŭtoro.

Esperantistoj devas tre specialan dankon al So Martin Westcott, la lerta prezidanto de l' Hastingsa' grupo, kiu donis al ili tiel ŝatindan legindaĵon.

LEGADAMIKO.

(1) La pudingo Kristnaska estas antikva kaj ĉiam tre populara kutimo en Anglujo ; kaj kvankam aliaj kutimoj malaperas, ĉiam ekzistas la pudingo

(2) La pudingo estas kuirata en tuko.

(3) Antaŭ Kristnasko la butikoj de vendistoj de kortbirdoj estas provizitaj je multege da anseroj. Estas necble enigi ilin dum la nokto, kaj policanoj estas komisitaj por gardi la bestojn (L'Illustration)

(4) Speciala magazeno « The Dickensian » celas konigi ĉion, kio rilatas aŭ presiĝas pri Ch. Dickens kaj iliaj verkoj.



# VINTRAJ LUDILOJ

## DE PAĈJO ESPERANTISTA.

Momente kiam finiĝis la 5<sup>a</sup> konkurso organizita de Sinjoro Lépine, Pariza polica prefekto, konkurso celanta instigi naskiĝon de l' elpensadoj de l' eltrovema pariza laboristo rilatantaj infanajn amuzilojn, konkurso kiu ebligis ĉiujare por industriistoj elmontri siajn elpensadojn por la novjaraj donacoj, ŝajnis al ni ĝustatempe prezenti al niaj legantoj kejkajn ideojn pri la ludiloj.

Ĉiuj pri infanaj psikologiistoj rimarkis, ne malantaŭen iri ĝis la ĉaro el bakita tero de l' hinda dramo, ke ne la plej luksegaj ludiloj kaŭzas la plej multe da plezuro al niaj malgrandaj viretoj. En sia imago, efektive, l' infano trovas la fontanon de sia amuzado, obeante pri tio, kaj antaŭe, al la homa leĝo de l' subjekto (desimemeco) de l' plezuro; aliedirante, la infano kiel la homo elserĉas la objektojn, kiuj, krom sia valoro, havigas al li ĝojon de si mem tiratan.

Tia pupo senforma aŭ senmembrigita estas pli amata de knabino ol la plej admiregindaj kreitaĵoj de l' fabrikistoj. La tabuleto, kiun ia bubo ŝipigas sur strataĵoj, estas pli granda ĝojdeveno ol la aŭtomobila elektra ŝipo, kiu elnaskas l' admiron de l' gepatroj, kuŝanta en la elmontro de bulvarda vendisto, kaj incitas l' envion de l' junaj ŝipistoj de l' pelvego de « Tuileries » (1).

Ho! tiu ludilo ne amuzas longe; se li sur naĝas, li havos devigajn haltojn same kiel veraj aŭtomobilaj boatoj; kaj kare kostinte kaj kontentiginte la vanecon de l' gepatroj aŭ de l' donacintoj, ĝi iros, senutila kaj forlasita restaĵo, per sia sona lignaĵo, okstruki ŝrankon aŭ grenejon.

Sur benko kaj kontraŭaj seĝoj ŝajnigantaj vagonon, du


infanoj kuŝiĝintaj ludis kvazaŭ nokton en vagono, kaj amuziĝis per tiu kopio de la reala vivo, sincere kaj malkare; tio estis ĝojo por l' infanoj kaj trankvileco por la gepatroj!

Oni do devas doni al infanoj ludilojn kiuj ebligas ekzercon por imago; kaj estas bone liveri nerompeblajn objektojn, kapablajn esti uzataj sen antaŭzorgoj kaj pasigi la horojn, kiujn la malbela vetero devigas restadi en la domo.

La veraj amikoj de l' infano eldiris de longe la ideojn ĵus skribitajn, kaj troviĝis paĉjoj kiuj, utiligantaj siajn libertempojn dum vintraj vesperoj, volis nutri imagon de sia idaro kreante mem ludilojn laŭ la ĉi supraj diritaĵoj.


Sin inspirante de l' plezuro gustumita en sia juneco, disponente sur tablo la dometojn de ligna ŝafejo, ili volis pli bone fari ol la industrio de la « Nigra arbaro », kaj ili konstruis, per ia materialo, tutan urbon kun ĝiaj monumentoj kaj fortikaĵoj.

Unu el niaj ilustraĵoj elmontras tion, kio estis efektiva, kaj vidigas, kuŝanta amfiteatre sur sabla altaĵeto, la tutaĵon de urbo, enrondigita per muregoj, flankita per turoj kaj borderita per rivereto. Levetu tiujn turojn: ili estas komunaj skatoloj el kava ligno, uzitaj por sendi poŝte specimenojn de fluidaĵoj; tiuj turetoj je l' tegmento pint-rondaj estas pecetoj el plumingoĵ tranĉitaj per tranĉileto; tiu gota dometo, kies tegmento elstaras, estas tiritita el tabuletoj de ligna cigarujo.



(1) Fama Pariza ĝardeno, kie kuŝas granda ronda pelvego, sur kiu infanoj naĝigas multajn ŝipetojn.





LIGNA VILAĜETO

*Per grandiga vidigilo oni povas ekvidi personaĵetojn.*

Tiu angulo de korto, kie Ludovika XIII<sup>a</sup> stilo najbaras kun antikvaj loĝejoj je ligna trabaro, ne havas alian konstruan materialon; la pintaj tegmentoj, kiuj kovras la triangulajn fasadojn estas tonditaj per tondilo por fero en metala skatolo.

Apartiga segileto sufiĉis por improvizi la dentojn de tiuj interturaj muregoj, kaj por detali la arkaĵetojn de tiu eta preĝejo kaj la ornamojn de l' alarmturo, kiuj ornamas la altan urbon.

Najletoj, iom da gluo kaj kelke da eltrovemo suĉis por kunarangi tabuletojn kaj ilin similigi al domoj.

Tavolo de olea koloraĵo metita sur tiun improvizitan materialon, restas nur desegni sur la seka pentraĵo, per inkaj strekoj, lapordojn kaj fenestrojn de tiuj miniaturaj konstruaĵoj.

Ili estas fortikaj la lignaj dometoj, kaj laŭ la volo de l' infanoj, ili povas manumiĝi senzorge, kaj ebligas ĉiujn fantaziojn de l' grupigo. Provizita per kelkaj tufoj el musko por simuli arbojn, la nova cito bezonis loĝantojn laŭ sia mezuro.

Personaĵetoj el zinko, de l' famaj fabrikejoj de plombsoldatoj de Herarichsen en Nürnbego, formas la loĝantaron de nia

malgrandiĝaĵo de urbo kaj alportas vivecon je l' malrektaj stratoj.

Jen procesio antaŭ la preĝejo, malvolviganta la sekvantaron de l' pastroj, flagoj, monaĥoj kaj fideluloj; jen la vendejo, kun la viveco de siaj mastrumaj interkonsentoj, sur la placo de l' Urbadomo; kaj la personaĵetoj ne tro troviĝas ellandigitaj, ĉar ni rimarkas similecon inter la ligna Urbadomo kaj ĝia granda Nürnbega frato.

Morgaŭ ĉiu tiu mikrokosmo estos rangigita en sian skatolegon, ĉar infanoj ĉeestos la lernejon; sed venonte Dimanĉe la urbo montriĝos en la lumo, fontano ĉiam nova por ludo kaj ĝojo.

Se ni povis enpenetrigi niajn gelegantojn en la konstruon kaj starigon de nia urbeto, en kiu arkitektistoj certe ekvidos konstruajn mankojn, estas ĉar la fondinto kaj la konstruinto estas Esperantistoj.

*Verkita por legantetoj de*

« TRA LA MONDO » kaj iliaj paĉoj, de  
RENÉ BLOTTIÈRE, el Parizo.



### Konkurso por Esperantaj geinstruantoj.

Tuj de nia naskiĝo, ni celis montri intereson de Esperanto por geinstruistoj, kaj ni aldonis, ke ni organizos konkurson speciale dediĉita al ili kaj al profesoroj de Esperanto.

La momento venis por efektivigi tiun projekton. Ni celas doni samtempe gravan rekompencan al sindonaj instruantoj de Esperanto, kiun la grupoj, malfeliĉe kaj bedaŭre, ne povas mone helpi; kaj valoran stimulaĵon al lernantoj.

Estas malfermata de « Tra la Mondo » granda tutmonda konkurso, kies kondiĉoj estas jenaj:

1<sup>o</sup> Povos partopreni en ĝi ĉiu persono instruanta pri Esperanto, je la sola kondiĉo ke, inter ĝiaj lernantoj, kvin almenaŭ abonos aŭ regule aĉetos « Tra la Mondo »; kaj ĉiu lernanto de tia instruanto, aboninta aŭ aĉetanta regule « Tra la Mondo », de l'unua numero.

2<sup>o</sup> La konkurso okazos la 30<sup>an</sup> de Aprilo laŭ programo simpla, sendita ĝustatempe, kaj la konkursaĵoj devos esti senditaj la 1<sup>an</sup> de majo al la Prezidanto de l' ĵugontaro.

3<sup>o</sup> Tiu ĵugantaro, konsistanta el profesoroj aprobitaj de la S. f. p. E., ekzamenos kiel eble plej rapide la tekstojn, tiamaniere ke, se ili ĝin deziras, la gajnintoj povos utiligi sian premion por ĉeesti la duan universalan Esperantan kongreson.

4<sup>o</sup> La premio Konsistos el 100 frankoj, inter kiuj 50 por la profesoro kaj 50 por la lernanto, sendotaj tuj post la aljuĝo de l' premio.

Avizo. — La konkurso okazos nur se estas almenaŭ 20 geinstruantoj enskribitaj. Premioj el 50 frankoj estos aldonataj por ĉiu serio el 10 pluaj enskriboj.

## Monologo de AŬGUSTO BAISSAC, (Alĝerio).

(*Li eniras penante starigi sian duonokulvitron antaŭ sia okulo*).

Mi estas certa, ke vi demandas al vi, ne sentime, kial, vane, mi penadas subteni ekvilibre tiun duonokulvitron. Post kvin minutoj via timo ne pludaŭros. Plu ĝi ne povos daŭri, ĉar tuj mi sciigos al vi pri mia situacio, kiu estas unu el la plej penaj. Cetere pripensu, ĝis kia grado nedube ĝi estas pena, por ke mi venu, kiel vi vidas, rakonti miajn historietojn antaŭ aro tiel nombra.

Do, antaŭ dudek du jaroj, — levigante ian matenon — pan! mi ekvidis ke mi estas enamiginta. Senutile mi skuigis, malfermis mian fenestron, subakvigadis mian tutan kapon en lavvazon, tio ne malaperis. Mi estis ja enamiginta; enamiginta de mia najbarino, adorinda vidvino. ... ĉiam nigre vestita. Gajega tio ne estis, sed ŝi tiel bone sin ornamas! (*Paŭzo*) Ĉu vi rimarkis, kiel la nigro bone ornamas la vidvinojn!

Eble estas pro tio, ke tiom da ili restas nekonsoleblaj... kiu scias?

Do mi manvestis min.... nigre, delikata atento, kaj diskrete mi alfrapis ŝian pardonon. Nia interparolado estis nekredeblega. Ne-kre-de-ble-ga! Tuj mi sciigas al vi ĝian konkludon.

— « Sinjoro, via peto flatas min; sed mia unua » edzo tro enestas, memore, en mia penso, por ke mi » povu akcepti duan. »

— « Tion mi tre komprenas, Sinjorino, sed escepto » farita por mi donus al mi la feliĉon. Tio okazis al » mi tiun ĉi matenon: mi levigante, pan! senutile mi » skuigis, malfermis mian fenestron..... »

— « Se mi cedus Sinjoro, estus je tiel stranga kondiĉo..... » (*Al la kunsidantaro*). Jen la nekredeblegaĵo; vi tuj vidos ...; ne-kre-de-ble-ga-ĵo!

— « Mia unua edzo, daŭrigas mia vidvino, estis » nomita Temistoklo. »

— « Nur mi konas samnomitan faman antikvan » militestron..... »

— « Ne estis li. Temistoklo min amis kaj mi amis » lin. »

— « Ni preterpasu Sinjorino; ni preterpasu. »

— « Li estis bona, servema, neniam reeniranta » post la deka vespere. Ĉiumatene mi alportis lian » ĉokoladon sur lian liton kaj li diris dankon! per » dolĉa voĉo. — Li sciis ankaŭ tre bone Esperanton » kaj ĉiam ni interparoladis per tiu belsona lingvo. » Li havis akademioficiran ordenon kaj ankaŭ » cikatron ĉe la ŝultro. »

— « Jes Sinjorino, li estis bravulo, sed.....! »

— « Kaj lia duonokulvitro Sinjoro! lia duonokul- » vitro admirinde almetita antaŭ sia okulo. Ĉiam » mi demandis al mi, kiamaniere li povis atingi tian » miregindan ekvilibron. — Sinjoro mi resumas: » Penadu por simili Temistoklo'n. Prenu lian nomon, » prenu lian vizaĝon, prenu lian tutan fizionomion; » kaj tuj dua edzeco ŝajnu por mi esti la sekvo de » l'unua. »

— « La dua eldono.... Ĉu urĝa estas la duonokul- » vitro? »

— « Necesega, Sinjoro, tie estis tuta Temistok- » lo ». (*Faŭzo*).

Ĉu tion vi ne trovas io nekredeblega?

Mi kuris al mia kombisto kaj ordonis, ke li faru al mi tiun ĉi kapon. Tia, kian vi vidas min, mi havas ja Temistoklan kapon. Li ne estis tro malbela. Mi prenos lian nomon kvankam beleta ĝi ne estas; dum iaj karesaj momentoj esti alvokata « Totoklo! » Aŭ ne, ĉar ni interparolados Esperante: Vi vidas ke mi bone ellernis tiun lingvon; (dek lecionoj ne plu); tiam ŝi alvokos min Teĉjo aŭ Temiĉjo, ha! tio estas gracia Temiĉjo (*plezure ridetante*) Temiĉjo!

La ĉokolado ĉiumatene sur mia lito, tio pli ol alio ne estas malagraba. Temistoklo diris al ŝi: Dankon! per dolĉa voĉo, mi diros al ŝi, dankon! per dolĉa voko: (*Akravoĉe*) Dankon! Aŭ (*plezurŝajne*) Ha dankon! Mi preferas: Ha dankon! tial ke, dirante (*akravoĉe*) dankon! ŝajnas, ke mi anoncas fervojan stacion.

Ĉar Temistoklo havis akademioficiran ordenon, mi aĉetis da violkolora rubando sufiĉe por meti sur ĉiujn miajn vestojn, jakon, veŝton, ĉemizon. eĉ flanelan veŝton, sed nur en mia hejmo ĉar ekstere tio ne estas permesita. Fine, la cikatro ĉe la ŝultro ne ŝajnas al mi necesega ĉar, kiam mia virino rimarkos ĝian neĉeestadon, estos tro malfrue... (*Ridetante malice*). Nedube estos tro malfrue.

(*Kalkulante per siaj fingroj*). Esperanto, la cikatro, la ĉokolado, la ordeno, ĉio estas tre bone sed restas la duonokulvitro, la malbenita duonokulvitro: Neeble subteni ĝin. Post oktaga nesukcesa provo, mi sendis al mia adorinda Eŭzebio, mi forĝis sciigi al vi ke oni nomas ŝin Eŭzebio, kelkajn versojn. Plezuron mi havos dirante ilin al vi; mi scias ilin parkere.

Al virino, kiu ordonis, ke mi portu duonokulvitron, kvankam tiu optikilo tute estas ŝanĝonta mian vidmanieron.

Mi estas verega sklavo, markizino.  
Sed viajn rajtojn ne trouzu mi petas.  
Per du okuloj mi vidas vin, diino;  
Postuli trian, tio kruela estas.

*Li longe rigardadas, fiere, la aŭdantaron*). Oni faras, kion oni povas!

Ŝi respondis, ke ŝi ne povas seniĝi je duonokulvitro. Ha se mia okulo ankaŭ ne povus seniĝi je tiu vidilo!... tio estus feliĉo; ... sed se mi ne havas la brovuĵan ostarkajon faritan kiel tiu de la estinta Temistoklo, kion fari! Ĉiu havas sian ostarkajon.

De hodiaŭ matene mi povas iom subteni ĝin, ne ŝanĝante mian fizionomion. (*Li metas ĝin kaj malbelege grimacas*). Kiam mi silentas ĝi ne moviĝas, sed tuj kiam mi malfermas la buŝon, ĝi defalas. Vidu! (*Li metas ĝin kaj raŭke ekkrias*). Ha!!! (*La duonokulvitro falas*). Vi vidas: Se mi ĝin gluus, tiam neeble ĝin demeti; tio naskus aliajn malhelpaĵojn. ... ĝi povus ĝeni min... (*ridetante*). Estas iaj momentoj, kiam ĝi povus ĝeni min.... Tiom pli ke ĝi min tute blindigas... nenion mi vidas;.. se iam mi sukcesos subteni ĝin, necese estos, ke mi tuj akiros hundeton.

(*Li realmetas senatente la okulvitron*). Ha mi ne konas la elpensinton de tiu ĉi vitrero sed se mi konas ĝin, mi aldirus: « Sinjoro.... » *Eksentante ke la okulvitro ne falas*). Sed, ĝi ne falas! ĝi ne falas! ĝi ne falas! Mi kuras al mia adorinda promesitulino. (*Li foriras palpe kiel blindulo*).

Originale verkita de AŬGUSTO BAISSAC.

# MIKS AJ O J.

## Por la propagando.

**Rakonto.** — Ĉirkaŭ larg'a tabl'o en mal'grand'a salon'o, sid'as patr'o kaj patr'in'o, ankoraŭ jun'a'j, fil'o kaj fil'in'o. Lamp'o est'as sur la tabl'o. La patr'o leg'as, la patr'in'o kudr'as, la knab'o skrib'as kaj la gentil'a knab'in'o lud'as kun bel'a pup'o. Sur mol'a tapiŝ'o, apud la pied'o'j de la patr'o, dorm'as bon'a hund'o. Mal'jun'a kat'in'o dorm'as ankaŭ en korb'o, antaŭ la kamen'o. Hom'o'j kaj best'o'j ŝajnas feliĉ'a'j.

**Demandaro.** — Kiu sid'as ĉirkaŭ la tabl'o? — La patr'o, la patr'in'o, la fil'o kaj la fil'in'o.

Kiel est'as la tabl'o? — Ĝi est'as lar'ĝa.  
Kie est'as la tabl'o? — Ĝi est'as en la salon'o.  
Ĉu la salon'o est'as grand'a? — Ne sinjor'o, ĝi ne esta's grand'a, ĝi est'as mal'grand'a. Kiu leg'as? — Kie est'as la lamp'o? — Ĉu la patr'o kudr'as? — Kiu kudr'as? Ĉu la patr'in'o skrib'as? — Kiu skrib'as? k. t. p., k. t. p.

TH. CART.

El la « Notions élémentaires et exercices de conversation », (Vidu la bibliografion).

### NOVA REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1<sup>e</sup> Ĉiuj amuzajoj, problemoj proponitaj kaj solvoj devas esti sendataj al Sinjoro Ch. Brunet, 59, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksajoj ».

2<sup>e</sup> Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devas esti sendataj al S<sup>ro</sup> Brunet antaŭ la dato montrata post la problemoj; kaj ne 15 tagoj post ricevo de la Revuo.

Ĉiuj legantoj povos sendi solvojn ĉar la templimo estos sufiĉe daŭra.

3<sup>e</sup> Divenintoj estos ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estos donacataj al la plej sagacaj.

4<sup>e</sup> Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝos specialajn premiojn.

### PROBLEMO 19<sup>a</sup> (SPECIALA POR KRISTNASKO).

Antaŭ viaj okuloj cifero = litermiksaĵo kiu nenion signifas. Vi devas tamen legi tion, kio estas skribita. Por tio: faldū, ŝiru, tranĉu, turnu, unuvorte agu kiel vi volos. Vi nur ne devos disŝiri la kadron.

La solvo estos akceptata nur simila al la nia.

K	I	T	A	T			
A	E	O	A	O			
D		R		A			
	I	M	D	N	O	O	S
	R	S	N	S			
	M	M	R	J			
	E	T	A	L			
		O	D				

Speciala premio por tiu Problemo: Duonjara abono por la 2<sup>a</sup> Jaro de « Tra la Mondo » lote montrita.

### Sovaĝa respondo!

Nov-Zelanda ĉefo petas misiiston, ke li baptu lin.

« Kiom da edzinoj vi havas? » demandas la pastro.

« Du » respondas la sovaĝulo.

« Do, mi ne povas bapti vin, ĉar nia religio malpermesas poligamion. » (pli ol unu edziĝo samtempe).

Post malmulta tempo revenas la sovaĝulo kaj diras:

« Vi nun povas bapti min, mi nun havas nur unu edzinon.

— Kaj la alia?

10.072

— Mi manĝis ŝin. »!!!

### PROBLEMO 20<sup>a</sup> (DE J. FLOURENS).

Mi estas samtempe kapo, koro, kaj vorto de tri diferencaj bestoj?

### PROBLEMO 21<sup>a</sup> (DE LA SAMA).

Oni min manĝas; returnite, ankoraŭ oni min manĝas?

### PROBLEMO 22<sup>a</sup> (DE F<sup>no</sup> DUMEZIL).

•  
• • •  
• • • • •  
• • •  
•

Konsonanto  
simpla vorto  
birdo  
paĝi por ion uzi  
gramatika finiĝo.

### PROBLEMO 23<sup>a</sup> (DE LA SAMA).

Mia unua estas disdona vorto  
mia dua malmoliĝo de l' epidermo  
kaj mia tuto estas vazo por trinki.

### PROBLEMO 24<sup>a</sup> (DE K. K. RI. K.)

Enigma.

Kiu ĝin konstruas, ĝin ne uzas;

Kiu ĝin aĉetas, ĝin ne amas;

Kiu ĝin uzas, tion ne scias

### PROBLEMO 30<sup>a</sup> (DE LA SAMA)

Mi havas kvar fratojn samaĝajn kiel mi sed diversmezurajn; mi estas la plej malgranda el ĉiuj kaj tamen kiam miaj fratoj kun mi vojaĝas, mi alvenas ĉiam kun ili. Ĉu vi min konas, nun?

La solvoj estos akceptataj ĝis la 30<sup>a</sup> de februaro 1906<sup>a</sup>.

Rim. Oni adrestu la solvojn NUR POSTKARTE al Sinjoro Brunet Ch. 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux.

### Atesto pri religia kapableco.

PASTRO: Kiom oni kalkulas da Dioj, mia amiketo?

JUNA KARLĈJO: Nur unu sola.

— Ha, kaj kial?

— Ĉar, oni diris al mi ke Dio estas ĉie, eĉ en la plej malgrandaj anguloj, tiamaniere alia Dio ne povus trovi lokon por loĝi sin. 10.072

— Kion ni donacos al via patrino, kara edzineto, ĉe ŝia nomfesto?

— Ian veston.

— Ne, vesto tuj rompiĝos. Ni donos al ŝi arĝentan pleton: tio estas malavara donaco, kaj poste ni ĝin trovos. 10072

## Propaganda Gazetaro.

### L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E, 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj.

**ABONO:** En Francujo: 3 fr.; ekster Francujo: 3,50 fr.

Sin turni: Al administranto, Louviers, (Eure), France.

### THE BRITISH ESPERANTIST.

Angla kaj esperanta lingvoj. Jarabono, 1 sh. 6 d. (2 fr.), 13, Arundelstreet, Strand, Londono (England).

### LA BELGA SONORIO.

Bonega propaganda revuo: france, flandre, kaj esperante.

Oficiala organo de la « Belgaj Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

**ABONOJ:** 4 fr. ĉiujare — Unu n° 0,40 — Kolektoj de antaŭaj jaroj, ĉiu 6,00 fr.

Sin turni al S<sup>o</sup> J. COOX, Duffel (Belgujo)

### GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate). Redaktata germane kaj esperante.

**Jara abono:** 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

### ESPERANTO.

France kaj esperante. Unu numero 10 cent., 24 n°j sinsekvaj 3 fr. Ĉe S<sup>o</sup> Paul Berthelot, Céret, P. O., France. Tre rekomendinda al franclingvaj samideanoj.

### SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direkto de A. Jimenez Loira. Abono 3 fr. (monata), unu numero 30 cent. Ĉe « Tra la Mondo »

### GEFRATARO ESPERANTISTA.

Itale kaj esperante — 4 fr. — oficiala organo de la ISpE. Enhavas vidaĵojn de Italujo — Ĉe « Tra la Mondo ».

### MEKSIKA LUMTURO.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Meksika societo por propagandi Esperanton. Eliras 6 fojojn jare — 3 frankojn — Ĉe D<sup>o</sup> A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla (Ver), Meksiko.

### THE ESPERANTIST.

Angle kaj esperante. 4 fr. — 41, Outer Temple, London W. C.

### SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo » 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la venonta numero.

## ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

### ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle L'artiga, Lima (Peruo).

### HOLANDA PIONIRO.

Holande kaj esperante. Organo de la novnaskiginta holanda Societo por propagando de Esperanto.

Tre subteninda por helpi movadon en Holando. Ĉe Drevs Uitterdijk, Hilversum, Holando.

### ĈILIO ESPERANTISTA

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe S<sup>o</sup> L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

### ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

### RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ruse kaj esperante. Oficiala organo de Societo « Espero ». Ĉe S<sup>o</sup> D. P. Wejsbrut, Troickij Prospekt, 14, Peterburgo.

## Esperanta Gazetaro.

### LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda bonege informata.

Abono 5 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abonoj estas akceptataj, de 1<sup>o</sup> komenciĝo de ĉiu monato, ĉe « Tra la Mondo ».

### ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por Blinduloj per esperanta Braille'a sistemo 3 f. — Ĉe S<sup>o</sup> Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

### ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu numero afrankita 0 f. 30. Jarabono: Francujo, 2 f.; alilande 2 f. 50. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

### JUNA ESPERANTISTO.

Tute esperante. Disvastigo de Esperanto inter la junularo 2 fr. — 9, Avenue des Vollandes, Genève, Suisse.

## LA MIÉLINE GELSON MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ La Falo de l'Harroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe  
**FERRÉ, BLOTTIÈRE et Cie**  
102, rue de Richelieu, Paris.



### ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEL

## Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE  
AUGUSTE MOUSTRASIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS  
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO  
21-23, PASSAGE CHOISEUL, 47-49  
B. DECLAY

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;  
1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.